

Parto 8:

Kronologio

Resumo kaj konkludoj

Kronologio pri la planlingva movado de Svislando La plej gravaj datoj el ĝia historio

1884

- Unua prelego pri Volapük en Oberuzwil/SG far instruisto Gottlieb Wirth.

1887

- En Varsovio aperas la *Unua Libro* de Esperanto far L.L. Zamenhof.
- Unuaj Volapük-klubo aperas en Herisau/AR, Stein am Rhein/SH, Bremgarten/AG, St. Gallen, Gossau, Kreuzlingen/TG, Eschenbach/LU, Luzern, Zürich, Basel, Bern.

1888

- Ekaperas la revuo *Volapükaflen jveizik* (Svisa Volapük-Amiko) kaj fondiĝas Valpükaklub jveizik (Svisa Volapük-Klubo); prezidanto fariĝas Jakob Walser.

1890

- Estas lanĉita la revuo *Jveizapot* (Svisa Poŝto) kiel posteulo de *Volapükaflen jveizik*.

1891

- Ekaperas la unua el kvar numeroj de *Glids volapükik se Solothurn* (ĝis 1994).

1898

- Kiel unua prelego pri Eo en Svislando estas konsiderata tiu de → Alfred Paul Dubois en Le Locle/NE (laŭ *EdEo*).

1900

- En Berno estas prezentita la efemera planlingva projekto → Langage Humain de iu Umano.
- F. Kürschner publikigas en Orselina/TI la efemeran planlingvan projekton → Lingua Komun.

1901

- La studenta unuiĝo Zofingia pozitive pritaksas Eon.

1903

- Svisa Esperanto-Societo (SES) estas fondita la 27an de septembro 1903 en Rolle/VD; ĝia unua prezidanto nomiĝas → Eugène Failletaz el Laŭzano.
- Ekaperas *Svisa Espero (SE)*, organo de SES.
- Fondiĝas EG en Ĝenevo, Carouge kaj Laŭzano.
- En 1903 Eon lernas → Edmond Privat kaj → Hector Hodler, kiuj fondas la gazeton *La Juna Esperantisto (de Ĝenevo)* kiel organon de Klubo de Junaj E-istoj en Ĝenevo (ĝis 1909).
- Unue en Le Locle/NE, poste en Les Brenets/NE, → Edouard Ducommun malfermas la unuan eksperimentan Eo-kurson en publika baza lernejo.
- → Jean Borel forveturas al Berlino.

1904

- La dua kunveno de SES okazas en Coppet/VD. Nova prezidanto de SES post la demisio de Failletaz fariĝas →Friedrich Schneeberger, kiu starigas samjare (aŭ en 1906) la EG Laufen.
- Fondiĝas EG en St. Gallen, Le Locle/NE kaj Les Brenets/NE.
- *Svisa Espero* aperas en la eldonejo de Oscar Hopf en Thun.
- Aperas la Eo-lernolibro por germanlingvanoj de →Jean Borel.
- Aperas la lernolibro pri Eo-stenografio de →Friedrich Schneeberger.

1905

- En Boulogne-sur-Mer (Francio) okazas la unua Universala Kongreso (UK) de Eo. La svisoj →Edmond Privat faras kongresan paroladon kaj →Friedrich Schneeberger verkas la kongresan raporton (kiu aperas en Laufen 1905).
- Fondiĝas EG de Bazelo (→Alfred Bader aliĝas al Eo), Zuriko kaj La Stelo en Ĝenevo. Estiĝas la kerno de la unua lucerna EG.
- En februaro 1905 la zurika filologo-hindeŭropologo →Eduard Schwyzer prelegas en Zuriko pri la problemoj de la universala lingvo (lia prelego aperas en 1906).
- Unua vizito de L.L. Zamenhof en Svislando.

1906

- En Ĝenevo okazas la 2a Universala Kongreso de Eo. Unua protestanta diservo en Eo. Dua vizito de L.L. Zamenhof en Svislando.
- En Ĝenevo →René de Saussure malfermas kaj direktas la Internacian Sciencan Oficejon E-istan, kie estas redaktata kaj administrata *Internacia Scienca Revuo*. Fine de 1906 en Ĝenevo ekzistas samtempe pluraj Eo-ĉeloj.
- La emerita kuracisto-psikiatro-sciencisto →Auguste Forel favore pledas por Eo.
- En sia pamfleto kontraŭ Eo, *A propos de la langue Espéranto*, Charles-Albert Cingria moka rifuzas Eon kiel „rusan salaton”.
- *Svisa Espero* mencias la fondon de EG en Berno, Laŭzano, Yverdon, Neŭŝatelo, La Chaux-de-Fonds, Soloturno, kaj raportas pri eta junulara EK en Weinfelden/TG. En Chur/GR prepariĝas la fondo de EG. En Grizono Eo estas propagandata de Emma Herzog.
- En Thun aperas la turisma prospekto *Tra Berna Oberlando* de Théophile Hopf.
- Aperas *Wilhelm Tell*, kvinakta dramo de Schiller. Laŭ la versmetro de la germana originalo esperantigita de L.E. Meier.
- Aperas *Manuel pratique de l'espéranto* de →Edmond Privat.

1907

- Fondiĝas laborista EG en Baden/AG, EG en Trogen/AR kaj Huttwil/BE. La adresaro de SES registras 601 anojn.
- →Hector Hodler transprenas la redaktadon de la revuo *Esperanto* el la manoj de ĝia fondinto kaj redaktoro Paul Berthelot.
- →René de Saussure publikigas en Ĝenevo la Eo-reformprojekton →Antido I kaj proponas la →Spesmilon kiel internacian helpan monistemon.
- En Ĝenevo estas prezentita la efemera planlingva projekto →Lanopikŭro de iu F. David.

1908

- Fondo de EG St. Gallen far →Hans Kürsteiner.
- Fondo de →Universala Eo-Asocio (UEA) en Ĝenevo (28a aprilo).
- En Meggen apud Lucerno instaliĝas la Internacia Esperanta Paradizo. En Berno starigas socialista EG. Aliaj Eo-feriejoj prepariĝas en Adelboden/BE kaj Davos/GR.
- Laŭ propono de →Eduard Stettler, vicprezidanto de SES, fondiĝas Svisa Esperanta Biblioteko (SEB) kun sidejo en Berno.

- Fone de la Ido-skismo → Friedrich Schneeberger demisias kiel SES-prezidanto kaj transiras al → Ido. Lin anstataŭas → René de Saussure. La Ido-movado ekformiĝas ankaŭ en Svislando.

1909

- Fondiĝas EG de Burgdorf kaj Davos-Platz, stariĝas Ĝeneva Esperantista Laborista Grupo. En Laŭzano ekzistas du EG: Laŭzana E-ista Grupo kaj EG de la Liberpensuloj-e-istoj (poste EG Frateco), en Morges estas inaŭgurita Eo-domo. *Svisa Espero* anoncas la ekziston de la Eo-feriejo 'Eldorado' en Adelboden.
- Tria vizito de L.L. Zamenhof en Svislando.
- En Ĝenevo mortas → Ernest Naville, eminenta ĝeneva filozofo, kiu apogis la ideon de neŭtrala universala lingvo kaj rekomendis Eon al la Akademio de moralaj kaj politikaj sciencoj kadre de Instituto de Francio en Parizo.
- Aperas prospekto pri la Glacieja ĝardeno en Lucerno.

1910

- Fondiĝas EG en Vevey/VD, Kreuzlingen/TG kaj Rorschach/SG.
- En Huttwil/BE aperas la revuo *Vespera Horo*, redaktata kaj eldonata de → Friedrich Uhlmann. Ĉi tiu gazeto mencias la ekziston de EG en Zofingen/AG kaj Glarus.
- Pri la avantaĝoj de neŭtrala universala lingvo prelegas en Bazelo kaj Berno Wilhelm Ostwald el Leipzig, nobelpremiito pri kemio (1909).
- → Auguste Forel prelegas en Berno pri 'Kulturceladoj de la nuntempo' kaj pozitive pritaksas Eon.
- En Ĝenevo estas publikigitaj la gravaj esperantologiaj studoj de → René de Saussure: *La construction logique des mots en espéranto, Resumo de la teorio de Antido, kun lingvaj kritikoj kaj klarigoj de konataj esperantistoj kaj idistoj*, kaj *La logika bazo de vortfarado en esperanto*. Samtempe de Saussure prezentas la Eo-reformprojekton → Antido II.
- → Eduard Stettler fariĝas direktoro de UEA (ĝis 1924).
- → Edmond Privat fondas la Internacian Eo-Instituton kun sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Novjorko (poste Cseh-Instituto).

1911

- Estas anoncita la fondo de EG Freienstein-Rorbas/ZH.
- → René de Saussure demisias kiel prezidanto de SES por pluediĉi sin al la propraj lingvoprojektoj. La prezidanta torĉo estas transdonita al → Eduard Stettler.
- En Berno estas fondita Verband für die Schaffung eines Weltspracheamtes.

1912

- *Svisa Espero* aperas en kombino kun *Monda Poŝto / Weltpost* (ĝis 1914).
- En Ĝenevo estas anoncita la starigo de la Nova Klubo Eo, en Zug EG Fidela Rondo.
- → René de Saussure publikigas en Ĝenevo la reformprojekton → Lingvo Kosmopolita / Lingvo Cosmopolita.
- Iu M. Rotter (aŭ Rothes) en Zŭrich prezentas la efemeran planlingvan projekton → Tersboca.
- Okaze de la internacia kongreso de socialistoj en Bazelo estas fondita laborista Ido-grupo.
- Aperas la unua parto de *Historio de la lingvo Esperanto* de → Edmond Privat.
- En Liono (Francio) mortas Henri Dor, e-isto el Vevey/VD.

1913

- En Berno okazas la 9a Universala Kongreso de Eo sub la alta protekto de → Emil Frey, prezidinto de la Svisa Konfederacio (1894) kaj oficanta direktoro de la Oficejo de la Internacia Telegrafa Unio.
- En Berno estas starigita katolika ES.
- Fondo de la svisa sekcio de IKUE en Zug.

- →Hans Jakob el Germanio engaĝiĝas kiel oficisto en la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo sub direktoro →Hector Hodler.
- →René de Saussure transloĝiĝas al Berno (lia frato, la lingvisto Ferdinand, mortas).
- Kvara kaj lasta vizito de L.L. Zamenhof en Svislando.
- En Leipzig aperas la libreto *Svisaj Rakontoj* kun verkaĵoj de Ernst Zahn, en Eo-traduko de Charlotte Pulvers.

1914

- Dum la unua mondmilito →Hans Jakob organizas nome de UEA en Ĝenevo la t.n. Dumilitan Servon de UEA kun la celo interŝanĝi korespondaĵojn inter la militantaj landoj, peradi monon precipe al militkaptitoj, sendi pakaĵojn kaj helpi tie, kie la Internacia Ruĝa Kruco ne intervenas. Ĉar e-istoj devas servi en la svisa armeo, la Eo-agado estas interrompita diversloke.
- Aperas la informo pri nova projekto de Svisa E-ista Biblioteko.

1915

- Fondiĝas EG en Lugano/TI.

1916

- En Samedan/GR Eo estas propagandata de Magdalena Grütter-Häberli.
- En *Cours de linguistique générale* de →Ferdinand de Saussure Eo kaj la planlingva demando estas pozitive pritaksataj.

1917

- Aperas →Lingvo Internatsia de Antido (→René de Saussure) kaj la studo *Les 'tares' de l'espéranto / Die 'Mängel' des Esperanto*. En *Svisa Espero* de Saussure aperigas sian Projekton de fonetika skribo por la lingvo internatsia.
- Al la Asotio por fonetika alfabeto internatsia aliĝas pluraj personoj kiel ekzemple →Auguste Forel, →Emma Chenevard kaj la germano Max Butin. (→René de Saussure rolas kiel sekretario de tiu asocio, kies adreso estas cĉ Hotelgasse 10, Bern.
- Ekaperas la gazeto *Suisian Idisto*, organo de Suisiana Ido-Societo en Oerlikon-Zürich sub la redaktado de la ĉefa aktivulo Albert Noetzli.

1918

- En Le Locle/NE forpasas →Alfred Paul Dubois, konata Eo-pioniro de la Neŭŝatela Ĵuraso.
- Geo Ferry (Georges Perrier) en St-Imier/BE prezentas la efemeran planlingvan projekton →Parlamento.

1919

- Pro la malbona sanstato de →Hector Hodler la oficejo de UEA estas translokita de Ĝenevo al Berno, kie UEA trovas restadejon dum kelkaj monatoj. Sub la berna adreso aperas la *Jarlibro* de UEA de 1919 kaj 1920.
- Inter 1919 kaj 1921 disponigas sin por la prezido de SES →Jean Wenger el Neuchâtel, membro de la Lingva Komitato kaj de la Akademio de Eo.
- Mortas →Henri Dubois, signifa Eo-pioniro en Ĝenevo.
- Mortas Théophile Hopf, svisa Eo-pioniro, kiu verkis la unuan svisan propagandan broŝuron pri Eo (1903/4), la turisman prospekton en Eo *Tra Berna Oberland* (1906) kaj kiu lanĉis la Eo-feriejon Eldorado en Adelboden.
- →René de Saussure publikigas en Berno la reformprojekton →Esperantido/Esperantida.

1920

- En Leysin/VD forpasas →Hector Hodler, filo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler (+1918)

kaj kunfondinto kaj prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĝenevo. Direktoro →Eduard Stettler transprenas la prezidon de UEA (ĝis 1924) kaj →Edmond Privat ekredaktas la revuon *Esperanto* (ĝis 1934).

- Laŭ la iniciato de →Edmond Privat 11 delegitoj prezentas en decembro al la Asembleo de Ligo de Nacioj projekton de rezolucio kun la celo enkonduki Eon en la publikajn lernejojn de la mondo. Pro la forta kontraŭstaro de Francio tiu unua provo fiaskas.
- Ekfunkcias Tiĉina Eo-Muzeo kaj Rondiranta Ekspozicio, kaj kelkaj komercaj firmaoj en Locarno ekuzas Eon.
- →Emma Chenevard publikigas en Neuchâtel lernolibron de la lingvo →Esperantido.

1921

- →Edmond Privat fariĝas prezidanto de SES (ĝis 1927).
- Okaze de la Dua Asembleo de Ligo de Nacioj en septembro la Eo-rezolucipropono de 1920 estas renovigita en identa formo.
- Eo estas enkondukita en la sepan (lastan) klason de la unuagradaj lernejoj, kiel oficiala provo dum unu jaro.

1922

- En Ĝenevo okazas grava konferenco pri la Eo-instruado, kiu estas aŭspiciata de la sekretario de →Ligo de Nacioj kaj kunvokita de →Pierre Bovet, direktoro de la Instituto Jean Jacques Rousseau, kiu aperigas ĉi-koncernan raporton. Dum sia kunveno de la 21a de septembro 1922 la Tria Asembleo de la Kvina Komitato akceptas kaj oficialigas la ĉi-koncernan Raporton de la Sekretariejo de la 28a de junio 1922.
- Laŭ informo de la revuo *Esperanto* (UEA) la Svisa Specimena Foiro en Bazelo uzas ankaŭ Eon kiel korespondlingvon.
- Aperas la gazeto *Ido* kiel daŭriganto de *Suisian Idisto* (Oerlikon, ĝis 1929).
- En Reval (Estonio) estas publikigita la planlingvo →Occidental de Edgar von Wahl.
- Mortas →Emil Frey, iama alta protektanto de la 9a UK de Eo en Berno (1913).

1923

- La revuo *Esperanto* mencias la fondon de EG en Baden/AG, Herisau/AR, Montreux/VD kaj Renens/VD.
- En 1923 →Jules Perlet sukcesas enkonduki la Eo-instruadon en la klerigan lernejon de la bernaj dungitoj (Fortbildungsschule des Bernischen Beamten- und Angestelltenverbands).
- En 1923 →Edmond Privat fariĝas prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Eo-Movado ICK (ĝis 1928).
- La Komisiono pri Intelektua Kunlaboro (angle: Committee on Intellectual Co-Operation) de Ligo de Nacioj sub la gvido de →Gonzague de Reynold, kiu nomas Eon „barbara lingvo“, traktante la demandon de neŭtrala universala lingvo en julio/aŭgusto, venas al negativaj konkludoj kaj malrekomendas internacian planlingvon.
- Aperas la biografio *Vivo de Zamenhof* (1923) de →Edmond Privat.
- Marcel Pesch prezentas en Ĝenevo la efemeran planlingvan projekton →Espido.

1924

- Eo rekonigiĝas de →Ligo de Nacioj kiel „klara lingvo“ en telegrafio. En septembro la decido de la Dua Komitato estas unanime konfirmita de la Plenkunsido de la Asembleo.
- Estas fondita →International Auxiliary Language Association in the United States (IALA) de Alice Vanderbilt Morris.
- En sia ĉefverko *La Vojo al la kulturo* →Auguste Forel favore pritaksas Eon.

1925

- En Ĝenevo okazas la 17a Universala Kongreso de Eo.
- Okaze de la ĝeneva UK → Pierre Bovet iniciatas la Someran Universitaton en Eo, dum kiu prelegas elstaraj sciencistoj, kiel → Charles Baudouin, konata psikoterapiisto, verkisto, poeto kaj humanisma filozofo.
- → Edmond Privat (Svislando) fariĝas prezidanto de UEA (ĝis 1928).
- Fondiĝas Svisa Asocio de Eo-Fervojistoj (SAEF).
- Mortas Armand Caumont, Eo-aganto en Vaŭdo.
- En Ĝenevo okazas la unua internacia konferenco de International Auxiliary Language Association (IALA).
- → René de Saussure publikigas en Berno kaj Ĝenevo la efemerajn reformplanlingvojn → Nov-Esperanto kaj → Mondialo.
- En Neuchâtel estas prezentita la efemera planlingva projekto → Latin Simplifié de L. Reverchon.
- O.D. Ribaulb prezentas en Ĝenevo la efemerajn planlingvajn sistemojn → Eo & → Espo.

1926

- Svisa Fervojista Sindikato (SEV) proklamas la superecon de Eo rilate al ĉiuj aliaj planlingvaj projektoj kaj rekomendas lerni la zamenhofan lingvon.
- Fondo de Naturamika Fakgrupo Eo ĉirkaŭ Karl Hiltbold (Montreux-Vevy/VD).
- Dum pasko okazas en Locarno/TI laborkonferenco de KR, ICK kaj la Komitato de UEA.
- Estas starigita Suisa Ido-Federuro.
- En Berno forpasas → Friedrich Schneeberger, prezidinto de SES kaj ĉefa reprezentanto de Ido.

1927

- Oficiale fondiĝas la lucerna EG.
- Aperas la dua parto de *Historio de la lingvo Esperanto* de → Edmond Privat, kiun SES nomas honora membro.

1928

- → Eduard Stettler fariĝas duafoje prezidanto de UEA (ĝis 1934).
- Aperas la monografieto de → Eduard Stettler *Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko*.
- Eo akceptiĝas kiel instruata fako en la beletra fakultato de la ĝeneva universitato.
- En Zuriko okazas la 7a internacia Ido-Kongreso.
- Romanda Ido-Societo transformiĝas en Sviss Association por Occidental (SAPO).
- Ekaperas *Svissia*, organo de SAPO (ĝis 1929). → Ric Berger aliĝas al Occidental.

1929

- En Ĝenevo aperas, dank' al subvencio de IALA, *Bibliografio de Internacia Lingvo* de Petro Stojan, kiu laboras ĉe UEA ĝis 1931; en Leipzig aperas, same kun IALA-subteno, *Originala Verkaro* de L.L. Zamenhof.
- En Ĝenevo estas fondita Laborista EG.
- EG en St. Gallen estas reorganizita kadre de la Nova EK.
- La Internacia Kongreso de la Universala Federiĝo de la pedagogiaj asocioj, kunvenanta en Ĝenevo, envicigas Eon inter la laborlingvoj.
- Fondiĝas la Ido-organizo Suis Uniono por la Linguo Internaciona (SULI).
- Ekaperas *Helvetia*, organo de Sviss Association por Occidental (ĝis 1933).
- → Otto Funke publikigas sian artikolon 'Das Weltsprachenproblem in England im 17. Jahrhundert'.

1930aj jaroj

- Lydia Woog-Scherer, komunista aktivulino kaj edzino de Edgar Woog, membro de la zurika urba konsilantaro, nacia konsilisto kaj kunfondinto de la Partio de la Laboro de Svislando (PdA, komunistoj), korespondas en Eo kun sovetiaj e-istoj.

1930

- La globtrotulo → Joseph R. Scherrer el Usono faras dujaran mondvojaĝon tra 43 landoj (1930-32), i.a. al Svislando, kiel speciala delegito de la Internacia Centra Komitato de la Eo-Movado (siajn impresojn li notas en la libro *Ĉirkau la Mondon kun la Verda Stelo*, kiu aperas en 1933).
- → Arthur Baur lernas Eon kaj aliĝas al Eo-movado.
- En Ĝenevo okazas la dua internacia konferenco de International Auxiliary Language Association (IALA).

1931

- → Edmond Privat akceptas Mahatma Gandhi en Svislando kaj vojaĝas kun li tra Francio, Anglio, Italio kaj Hindio. Li publikigas siajn librojn *Le choc des patriotismes. Les sentiments collectifs et la morale entre nations* kaj *Esprimo de sentoj en esperanto*. En Londono aperas la angla traduko *The Life of Zamenhof*.
- Aperas la romanĉa eldono de *Clev da l'Esperanto* en la serio de la Eo-ŝlosiloj.
- Dum la dua internacia lingvista kongreso en Ĝenevo pluraj signifaj lingvistoj esprimiĝas favore al la planlingva demando kaj konfirmas sian simpatian pri IALA.
- Mortas → Auguste Forel, kuracisto-psikiatro kaj iama apoganto de la mondlingva ideo. En sia aŭtobiografio *Rerigardo al mia vivo* (1935) li favore pritaksas Eon.

1932

- La direkto de la svisaj fervojoj nuligas la statuson de la samrajteco de la Eo-kursoj por fervojistoj.
- Tiberio Morariu kaj Andreo Cseh gvidas Eo-kursojn en Svislando.
- Al la Eo-movado aliĝas → Otto Walder.
- En Ĝenevo estas prezentita → Weltverkehrssprache de E. Ritter.
- Estas prezentita la efemera planlingva projekto → Ablemonde de Gustav Schwarz.

1933

- En Berno estas inaŭgurita → Svisa Esperanto-Instituto far → Eduard Spielmann, kiu funkcias ĝis 1938.
- En Fribourg mortas → Adolphe Creux, iama idisto kaj occidentalisto.

1934

- → Hans Kürsteiner fariĝas ĉefdelegito de UEA (ĝis 1936).
- Forpasas → Arnold Schrag, iama aktiva idisto, transirinta al Occidental.

1935

- *Svisa Espero* sciigas siajn legantojn pri la starigo de EG en Gersau/SZ kaj pri EG Wattwil/SG.
- En Budapeŝto aperas *Interpopola Konduto* de Edmond Privat en Eo.
- Barney Rosenbaum publikigas en Basel la efemeran planlingvan projekton → Fitusa.

1936

- En la jarkunveno de SES Karl Max Liniger, delegito de UEA, raportas kun ĉagreno pri la plano de UEA translokigi la sidejon, oficejon kaj bibliotekon de UEA al eksterlando. SES-prezidanto Maeder rekomendas al la membroj subteni deklaron kontraŭ tiu decido kaj skribi oficialan protestleteron al Bastien, prezidanto de UEA.

- Post kiam fiaskas repacigaj traktadoj dum la UK en Vieno, en septembro Bastien anoncas la fondon de Internacia Eo-Ligo (IEL) kun sidejo en Britio. La organiza dueco de la Eo-movado daŭras ĝis 1947.
- La hungara Eo-poeto Gyula (Julio) Baghy prelege vizitas Svislandon kaj Joseph R. Scherer entreprenas duan vojaĝon tra 12 eŭropaj landoj.

1937

- Dum plimulto de la individua membraro aliĝas al IEL, en la jarkunveno de SES la reprezentantoj de la zurika ES proponas, ke ankaŭ SES aliĝu al IEL. Tamen la SES-membraro decidas ankoraŭ ne aliĝi.
- → André Schild anoncas la refondon de la bazela ES.
- En Ĝenevo mortas → Juliette Baudin-Vatré, edzino de → Henri Vatré kaj Eo-verkistino.
- → René de Saussure publikigas en Berno la Eo-reformplanlingvon → Esperanto II.
- La idisto → Alphonse Matejka aliĝas al la Occidental-movado.
- En Martigny/VS mortas la aŭgusteno → Jules Gross, konata valeza idisto.

1938

- SES decidas aliĝi al IEL kaj modifas sian statuton.
- EG Olten estas restarigita.
- La lingvosciencisto → Albert Debrunner, kunlaborinto de IALA, ofertas en la berna universitato lekcionojn kaj kursojn pri la historio de la planlingvoj. Ankaŭ lia samuniversitata kolego → Otto Funke iom okupiĝas pri la demando de neŭtralaj universalaj lingvoj.
- En Berno forpasas → Eduard Spielmann, fondinto de la Svisa Eo-Instituto (1933), kiu per tio ĉesas funkcii.
- En Riehen/BS mortas → Friedrich Uhlmann, ĉefredaktinto de la Eo-periodaĵo *Vespera Horo* (eldonita en Huttwil en 1910), tradukinto de la verko *Kulturceladoj de la nuntempo* de → Auguste Forel (1911) kaj kompilinto de la lernolibro kaj vortaro por la Ruĝa Kruco.
- → Otto Walder fariĝas ĉefdelegito de UEA (ĝis 1968).
- En Basel estas prezentita la efemera planlingva projekto → Soma de Barney Rosenbaum.

1939

- En Berno okazas la 31a Universala Kongreso de Eo.
- Aperas → *Svisa Antologio*, signifa verko pri tradukita svisa Eo-literaturo, sub la ĉefredaktado de → Arthur Baur, kiu reprezentas SES en la Svisa Packonsilio kaj en la Svisa Unesko-Komisiono.
- Laborista Grupo E-ista en Bazelo ĉesas ekzisti.
- Dum la dua mondmilito → Hans Jakob en Ĝenevo organizas, helpata de aliaj kaj nome de la malnova UEA, la subtenon al la familio Zamenhof per regula sendado de nutraĵoj.
- Aperas la Eo-versio de la oficiala prospekto de la ĉokolada firmao Wander, *Taso da Ovomaltine fortigas ankaŭ vin*.
- → Jakob Kreis enkondukas la 'svisan periodon' de la Ido-movado.
- En Neuchâtel mortas → Emma Chenevard, iama helpantino de → René de Saussure en liaj reformprojektoj (ĉefe → Esperantido kaj → Nov-Esperanto)

1940

- En Berno mortas → Eduard Stettler, frua Eo-pioniro de 1908 kaj aktiva kunlaboranto de UEA, direktoro kaj fine prezidanto de la asocio (1920-24 kaj 1928-34).
- En → St. Gallen forpasas Rudolf Gottlieb Maeder, signifa loka e-isto.
- Mortas → Anton Waltisbühl, iama volapükisto kaj idisto, kaj → Albert Noetzli, ĉefa svisa idisto.

1941

- →Hans Kürsteiner akceptas la postenon de la prezidanto de la malnova UEA kaj plenumas ĝin ĝis 1947.
- Estas starigita EG Rheineck (aŭ en 1944).

1942

- Dum la milito Eo estas instruata en svisaj koncentrejoj por rifuĝintoj.
- Aperas la lernolibro de →Alphonse Matejka, *Occidental, die internationale Welthilfssprache*.

1943

- En Neuchâtel mortas →Georges Stroele, frua Eo-pioniro kaj kunfondinto de la neŭsatela EG.
- La laboristaj e-istoj malakceptas kunfandiĝon kun SES.
- Ekaperas *Svisa Ido-Buletino*.
- En Zofingen/AG mortas →Engelhard Pargätzi, Eo-pioniro en Grizono, poste transirinta al Ido.
- En Biel-Bienne forpasas →Jean Denzler, iama idisto kaj occidentalisto.

1944

- SES ekfunkciigas Svisan Eo-Arĥivon (SEA) kun la celo fariĝi 'universala informejo' pri la svisa movado. Samtempe *Svisa Espero* anoncas la fondon de Svisa Eo-Biblioteko.
- En La Chaux-de-Fonds/NE mortas Jules Wolf, fervora loka e-isto (→familio Wolf).
- La occidentalistoj aperigas kelkajn esencajn propagandajn artikolojn kiel *Wieso ist Occidental die endgültige Welthilfssprache* de →Alphonse Matejka, *Die heutige Situation der Weltsprachenfrage* de →Fritz Haas, k.a.

1945

- En Le Daley/VD mortas Pierre Cérésolle, fondinto de →Civilservo Internacia, en kiu deĵoris ankaŭ e-istoj.
- Ĉe SES aperas *Pensoj de Zamenhof*.
- Aperas aliaj Occidental-artikoloj kaj -libroj: *Die Sprachenfrage* de →Ludwig Klaesi, *Wörterbuch Occidental-Deutsch und Deutsch-Occidental* de →Alphonse Matejka, k.a.
- Forpasas Eduard Hiltbrand, iama prezidanto de la Ido-grupo Thalwil/ZH.

1946

- Andreo Cseh instruas Eon en St. Gallen.
- Starto de la Eo-radioprogramo de la kurtonda →Svisa Radio Internacia (SRI) kun →Edmond Privat kaj →Arthur Baur.
- Per la Interkonsento de Berno en julio inter IEL kaj UEA estas enkondukita la unua etapo de la reunuigo de ambaŭ organizoj.
- En Lugano/TI forpasas →Jean Borel, signifa neŭsatel-devena e-isto kaj Eo-aganto en Svislando kaj Germanio antaŭ la dua mondmilito, frato de Jules Borel.

1947

- La 32a →Universala Kongreso de Eo okazas en Berno.
- En la Pestalozzi-infanvilaĝo en Trogen/AR okazas Eo-kursoj de Julia Isbrücker, konata nederlanda e-istino el Hago.
- SES eldonas la librojn *Ĉe la sanktaj akvoj* de J.C. Heer kaj *Du amosentaj noveloj*, entenanta *Imenlago* de Theodor Storm kaj *Maruška* de Mela Escherich, en la traduko de →Alfred Bader.

- En Neuchâtel mortas Jules Borel, frato de →Jean Borel, (+1946), grava Eo-pioniro de Svislando kaj Germanio antaŭ la dua mondmilito.
- →Walter Kobelt, membro de Universala Ligo (de Andreo Cseh), organizas Eo-feriadon en la naturamika domo Reutspierre super Meiringen/BE.
- →Hans Hermann Kürsteiner, forlasanta la UEA-prezidon, estas elektita honora membro de UEA.
- →André Schild publikigas sian propran planlingvan projekton →Neolatino.
- Aperas *Vocabulaire occidental-français* de →Ric Berger.
- Mortas Joseph Feierabend, kunfondinto de SES kaj posta idisto.
- Forpasas William Perrochon, signifa Eo-fervojisto.

1948

- →Jakob Sprenger en Gams/SG ekoficas kiel oficiala posteulo de J.M. Schleyer (ĝis 1950).

1949

- Mortas →Henri Dubois, fondinto de la ĝeneva EG La Stelo.
- La Occidental-movado adoptas la nomon Interlingue.

1950

- →Hans Herrmann fondas ES en sia tiama loĝloko Zug.
- En Nottingham (Britio) mortas →Cezaro Rossetti, svisdevena e-isto kaj aŭtoro de la romano *Kredu min, Sinjorino*.

1951

- Estas starigita la Junular-Sekcio de SES / Eo-Junularo de Svislando (EJS), la fundamento de la junulara Eo-movado en Svislando post la dua mondmilito.
- En la popola altlernejo en Zuriko komenciĝas la Koordinitaj Eo-kursoj (KEK), kiuj estas lanĉitaj de la zurika juristino kaj e-istino →Tina Peter-Rüetschi kaj realigitaj de →Werner Laederach kaj →Fritz Liechti; ĉi tiu agado daŭras ĝis 1961.
- Ekaperas *La Migranto*, organo de la Eo-naturamikoj.
- Estas starigita la svisa KELI-sekcio.
- →Hans Jakob forlasas la UEA-estraron kaj eksiĝas kiel redaktoro de *Esperanto*.
- Alexander Gode-von Aesch publikigas la projekton →Interlingua de IALA.
- En Les Brenets/NE mortas →Edouard Ducommun, konata Eo-pioniro en la Neŭŝatela Ĵuraso ekde la komenco de la jarcento.
- Forpasas Franz Zimmermann, aktiva idisto en St. Gallen.
- Mortas →Jakob Sprenger, fervora volapükisto kaj 4a oficiala posteulo de J.M. Schleyer.

1952

- Bibliotekisto de SES fariĝas →Fritz Schwarz, motoro de EG Thun/BE.
- →Hans Bipp fariĝas prezidanto de SAEF (ĝis 1956).
- →Claude Gacond komencas lerni Eon kaj aliĝas al la Eo-movado.
- Dum la dutaga internacia junulara kunveno en Bazelo trilingva kongresa rezolucio sugestas la aprobon kaj aplikadon de Eo kiel ilon por pli bona internacia kompreniĝo kaj rekomendas la instruadon de Eo en la svisaj lernejoj. La kunvenon ĉeestas oficialulo de la bazelurba departemento pri edukado (Fritz Wenk) kaj estas laŭtlegita la bondezira mesaĝo de Max Petitpierre, federacia ministro de Svislando.
- Forpasas →Karl Jost, signifa zurika e-isto de 1903.

1953

- En la Svisa Nacia Biblioteko (Berno) Eo-ekspozicio estas instalita sub la aŭspicio de SES.

- La respondo de Svisa Departemento pri internaj aferoj koncerne la *Raporton pri la enketo rilate la internacian peticion favore de Eo en Svislando* prezentas ekstreme negativan konkludon pri Eo. SES proteste reagas.

1954

- Lige kun la alprenota Unesko-rezolucio pri Eo en Montevideo, en junio SES-delegacio estas akceptita en aŭdienco ĉe la prezidanto de la Svisa Konfederacio, Max Petitpierre. En la unua voĉdono de Montevideo la svisa delegacio voĉdonas kontraŭ, en la dua tamen por la rezolucia teksto.
- →Hanni Fischer-Buri restarigas la →Svisan Eo-Instituton en Berno.
- SES komencas organizi dusemajnan lingvoferian Eo-kulturaranĝon en la →Kastelo Münchenwiler kun →geonismo kiel kadra temo kaj →La Ora Metodo kiel kurs-strategio.
- Komisiita de SES, →Arthur Baur lanĉas la servon *Esperanto-Information* por la nacilingva gazetaro german- kaj franclingva (ĝis 1987 aperas entute 160 germanlingvaj eldonoj).
- →Claude Gacond komencas sian laboron por la planlingva arkivejo CDELI en La Chaux-de-Fonds.
- Post la publikigo de Interlingua de IALA estas fondita Union pro Interlingua de Helvetia.

1955

- En Zuriko okazas la 7a IFEF-kongreso.
- →William Perrenoud publikigas sian *Fundamenton de Geonismo*.
- En Berno mortas →Jakob Schmid, grava svisa Eo-pioniro, membro de la Lingva Komitato kaj ekzamena komitato de SES, prezidinto de LKK de la bernaj UK en 1913 kaj 1939.

1956

- En Biel-Bienne →Marcel Erbetta lanĉas la interlernejan projekton →Grajnoj en Vento kun la celo vivigi la internacian korespondadon inter gelernantoj per Eo.
- Ekaperas *La Juna Voĉo*, organo de Esperanto-Junularo de Svislando (EJS).
- →Claude Gacond kaj liaj helpantoj komencas organizi regule la skiferiojn en Adelboden (21 fojoj ĝis 1978).
- →Claude Gacond eksperimente instruas Eon en la lernejo de La Sagne/NE.
- →Ric Berger aliĝas al →Interlingua (IALA).

1957

- SES estas reprezentita en la svisa nacia Unesko-komisiono de →Werner Laederach.
- Estas organizitaj Eo-kursoj en la komercaj lernejoj de Aarau kaj Baden.
- →Madeleine Stakian ekprezidas la ĝenevan EG La Stelo (ĝis 1994).
- En →Kastelo Münchenwiler estas organizita la KELI-kongreso. Ekaperas *Kristana Bulteno*, organo de la sekcio (ĝis 1988).
- En Thun/BE mortas →Arnold Bohren, iama direktoro de Svisa Asekurejo kontraŭ akcidentoj (SUVA) en Lucerno, apoginto de la Eo-movado.
- En St. Gallen mortas Otto Kostezer, fervora Ido-propagandisto en sia urbo.
- En Luzern forpasas Josef Aschwanden, iama aktiva adepto de la planlingvo Occidental.

1958

- En Biel-Bienne estas fondita la asocio →Esperanto-Edukistaro de Svislando (EES).
- Estas starigita Svisa Katolika Unuiĝo Esperantista (SKUE).
- →Kurt Greutert ekprezidas (ĝis 1966) SAEF kaj lanĉas la informilon *Svisa Fervojisto*.
- →Marcel Erbetta organizas en Broc/FR internacian pedagogian semajnon sub la aŭspicio de la Freinet-movado.
- Aperas la kurso *Esperanto per Post* de →Arthur Baur (reeldonita en 1963) kaj *Federala Sperto* de →Edmond Privat.

- Okazas internacia renkontiĝo de la occidentalistoj en St. Gallen kaj Romanshorn/TG.
- →Alphonse Matejka en La Chaux-de-Fonds/NE transprenas la redaktadon de la periodaĵo *Cosmoglotta*, ĉeforgano de la movado Occidental-Interlingue.
- →Flurin Maissen en Disentis/GR aperigas la revueton *Li Gymnasiast* kaj propagandas la lingvon Occidental-Interlingue.
- En Berno mortas →Albert Debrunner, kunlaborinto de IALA.

1959

- La centjaran jubileon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof oni festas ankaŭ en Svislando per diversaj manifestacioj.
- En Svislando disvolviĝas la prelegvojaĝo de la japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino kun prelegoj pri Japanio en diversaj urboj.
- SAEF organizas la unuan Eŭropan Ferian Semajnon, turisman aranĝon okazantan ĝis 1977 sub la aŭspicio de IFEF.
- →Michel Frésard eksperimente instruas Eon al bazlernejoj en Les Bois/JU.
- →Ric Berger, Morges/VD, ekredaktas *Currero International*, la organon de Union Mundial pro Interlingua (UMI, ĝis 1963).
- En St. Gallen aperas la efemera planlingva projekto →Lingua de Europa de iu J.Ch. Homo.
- W. Schaetzel prezentas en Ĝenevo la efemeran planlingvan projekton →Lingua Europaea.

1960

- Charles Ecabert organizas la trian manifestacion de la Komisiono Eo lernejen en Neuchâtel.
- Aperas la kajero *Deine zweite Sprache* de →Arthur Baur en la svisa infanlibra serio SJW.
- Aperas *En Tempo rekorda* de →William Perrenoud.
- →Tazio Carlevaro aliĝas al la Eo-movado.

1961

- Estas fondita Tiĉina Eo-Ligo (TEL).
- En Berno mortas →Hanni Fischer-Buri, iama prezidantino de la berna EG, LKK-anino de la 32a UK (Bern 1947) kaj motoro de →Svisa Eo-Instituto (dua fazo; la instituto ĉesas ekzisti en tiu jaro).
- Mortas Charles Jayet, frua e-isto, gvida forto de la loka Eo-movado en Morges/VD kaj multjara delegito de UEA en sia urbo.
- En Bern forpasas →Hermann Alfred Tanner, iama e-isto, idisto transirinta al Occidental.

1962

- 75-jariĝo de la lingvo Eo.
- SES ekŝiĝas el la Svisa Packonsilio.
- En Rolle/VD mortas →Edmond Privat, probable la plej elstara e-isto de Svislando kun internacia signifo.
- En Neuchâtel mortas →Charles Ecabert, redaktoro de *Svisa Espero* kaj redaktoro de la Eo-programo de SRI.
- Mortas →Jules Gilliard, loĝinta en Neuveville/BE, iama prezidanto de SES.
- Posteulo de Privat kaj Ecabert ĉe SRI fariĝas →Claude Gacond, kiu poste prizorgas regule kun sia edzino Andrée Gacond-Giroud la ĵaŭdajn Eo-elsendojn (kaj de 1985 ankaŭ la sabatajn) de la berna radiostacio.
- En Zürich forpasas →Ludwig Klaesi, mecenato de la Occidental-movado.
- En St. Gallen mortas la loka occidentalisto →Kurt Hamburger.
- Stariĝas Editions pro Interlingua far →Ric Berger en Morges/VD.
- Aperas la libro *Aventuroj de Pioniro* de →Edmond Privat.

1963

- La japanaj e-istoj Kĵotaro Deguĉi (Oomoto) kaj Joŝimi Umeda (TEJO) vizitas Svislandon.

- En la vorarlberga ĉefurbo Bregenz okazas la unua trilanda renkontiĝo de la svisaj, sudgermanaj kaj aŭstraj e-istoj.

1964

- Estas fondita EK Wil/SG.
- Ekaperas la nova informilo de La Stelo sub la titolo *Brasikfolio*.
- Okaze de la kongreso de Svisa Fervojista Sindikato (SEV) en 1964 en Interlaken estis traktita, en ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de politikaj kaj fervojistaj instancoj, rezolucipropono rilate la enkondukon de Eo en la lernejojn.
- En Berno mortas → Jules Perlet, frua pioniro de la svisa kaj berna Eo-movadoj, precipe fervojista, iama ĝenerala sekretario de SES kaj LKK-ano de la 9a UK (Bern 1913).
- La Trafikmuzeo en Lucerno disponigas al la e-istoj konstantan lokon en formo de varbafiŝa standeto.
- La trilanda renkontiĝo okazas en Lindau (Bavario).

1965

- Kadre de la trilanda renkontiĝo en Romanshorn/TG okazas la inaŭguro de *Esperantoweg*.
- En Gwatt apud Thun okazas internacia renkontiĝo de blindaj e-istoj.
- Sub la direktoro Gerd Padel la Eo-disaŭdigo de Svisa Kurtonda Radio (Svisa Radio Internacia) estas interrompita pro „buĝetaj kialoj“, sed post protestoj flanke de la aŭskultantoj kaj deklonata sendopaŭzo la Eo-programo estas daŭrigita.
- → Giorgio Silfer lernas Eon en Italio kaj aliĝas al la Eo-movado.
- En Zuriko aperas la lernolibro *Universala Eo-Stenografio Unesteno*, kiu estas Eo-adapto de la sistemo Stolze-Schrey kaj verkita de → Johannes Jakob Sturzenegger kaj Heinrich Matzinger.
- En Grandchamp-Boudry/NE mortas → Pierre Bovet, iama direktoro de la Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo, kadre de kiu estis organizitaj gravaj poresperantaj agadoj.
- Forpasas Karl Max Liniger, iama prezidanto de la ĝeneva UEA (1936-41).

1966

- La trilanda renkontiĝo de tiu jaro okazas en Bazelo, kaj la IKUE-kongreso disvolviĝas en St. Gallen.
- → Ric Berger en Morges/VD ekredaktas la revuon *Revista de Interlingua* (ĝis 1983).

1967

- CDELI estas statute oficialigita kiel aparta fako de la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds/NE.
- La soloturna EG estas restarigita de Doris Schmid.
- Ekaperas *Lozana Informilo*, organo de Laŭzana ES.
- En Ĝenevo mortas → Hans Jakob, signifa svisa kaj internacia e-isto, kiu dum duona jarcento laboris por UEA.

1968

- En Biel-Bienne estas fondita la asocio → Kultura Centro Esperantista (KCE). La unua oficejo ekfunkcias en la privata domo de Claude kaj Andrée Gacond en La Sagne/NE.
- En Basel mortas → Alfred Bader, frua Eo-pioniro en sia urbo.
- En St. Gallen forpasas → Hans Hermann Kürsteiner, frua grava svisa Eo-pioniro kaj iama prezidanto de UEA (1941-47, honorita en 1947).
- En Ĝenevo mortas → Jakob Kreis-Schneeberger, elstara svisa idisto kun internacia signifo.
- En Langnau i.E./BE mortas Erwin Zuber.

1969

- Ekaperas → *Monata Cirkulero*, bulteno de KCE, kiu estas redaktata de → Claude Gacond (ĝis 1990), kaj daŭrigita sub alies redaktado ĝis 1994.
- En Chur mortas → Wilhelm Haase-Meister, fervora e-isto en Burgdorf/BE (antaŭ la unua mondmilito), poste en Olten kaj Grizono (ekde 1931).
- En Thun/BE forpasas → Fritz Schwarz, konata e-isto de 1908 en sia regiono.
- La 9an de septembro estas starigita en Schüpfheim/LU Foundation Bákonyi pro Lingua Universal, kiu laboras ĉefe favore al → Interlingua.
- En Locarno/TI mortas Ety Graeffe, aktiva e-istino en siaj urbo kaj regiono.

1970aj jaroj

- Funkcias Svisa Unuiĝo de Blindaj E-istoj, kies prezidanto estas Giovan' Antonio Pellanda en Winterthur/ZH.
- Komisiono Esperanto lernejen (L'Espéranto à l'école) agadas kiel laŭstatuta faka organo de KCE kaj kiel integra parto de la laborplano de KCE.
- Grupo E-ista de Locarno (GRESLO) funkcias sub la gvido de Alfonsito Varini, → Dante Bertolini k.a.
- La lingvisto → Max Mangold, sviso laŭ deveno kaj profesoro pri fonetiko kaj fonologio en la universitato de Saarbrücken (Germanio), verkas plurajn studojn, en kiu li traktas la problemon de la lernebleco de Eo.

1970

- Aperas la unua numero de la revuo → *Literatura Foiro (LF)* kiel daŭriganto de *Norda Prismo*; ĉefredaktoro fariĝas → Giorgio Silber.

1971

- La biela EG anoncas la ĉesigon de sia ekzistado.
- Mortas Robert Stucki, iama fervora idisto en Wallisellen/ZH kaj St. Gallen.
- En Winterthur/ZH mortas → Fritz Haas, iama idisto kaj fervora loka occidentalisto.

1972

- Okazas la 24a IFEF-kongreso en Lugano.
- Mortas Franz Rispy, iama aktiva e-isto en Turgovio.
- En Zuriko mortas Arnold Schweizer, fervora aktivulo de la zurika ES.

1973

- Estas fondita la asocio Svisa Eo-Junularo (SEJ, kiu ekzistas ĝis 1980).
- En Laŭzano okazas la 28a kongreso de la SAT-Amikaro.
- La organo de SES ŝanĝas sian nomon de *Svisa Espero* al *Svisa Esperanto-Revuo/SER* (aperas ĝis 1990).
- En Rochefort/NE forpasas → Marcel Jaccard, iama SES-prezidanto.
- En Arbedo-Castione mortas Giovanni Sasselli, iama aktiva tiĉina e-isto fervojista.

1974

- En 1974 → Andres Bickel kunfondas la ĝenevan junularan EG kaj ekprezidas la asocion Svisa Eo-Junularo (SEJ, ĝis 1980).
- Ekde tiu jaro kun la urbo La Chaux-de-Fonds estas intertraktata la starigo de fondumo (fondaĵo) → Gastejo Edmond Privat (GEP), kies celo estas disponigi ejojn por la klientoj de KCE.
- Estas fondita Svisa Asocio de Esperanto-Instruistoj (SAEI) kiel membro de ILEI, sub la gvido de → Kurt Greutert.

- Ekaperas *Tiĉina Informilo*, organo de Tiĉina Esperanto-Ligo (TEL), kaj komenciĝas la tradicio de la kultura semajnfino e-ista en Lugano.

1975

- La centra biblioteko de Zuriko prezentas ekspozicion pri Eo.
- →Erna Döring en Bazelo transprenas la redaktadon de *La Migranto* kaj ekoficas kiel internacia fakreferantino de TANEF (ĝis 1996).
- Mortas César Amaudruz, iama aktivulo de la laŭzana laborista ES.

1976

- Estas lanĉita varmaera →Eo-balono. La oficiala inaŭguro-bapto okazas ĉe Guldenen sur Forch apud Zuriko.
- →Erna Döring estas elektita kiel nova prezidantino de la bazela ES.
- Internacia Feria Alternejo (IFA) de KCE estas inaŭgurita en La Chaux-de-Fonds/NE.
- →Arthur Baur publikigas la tekston *Von der Utopie zur Wirklichkeit, Die Geschichte der Plansprachen*.

1977

- La svisa ILEI-sekcio reviviĝas dank' al la klopodoj de →Marcel Erbetta, →Olivier Tzaut kaj →Claude Gacond.
- →Andres Bickel kaj Marie-Louise Münger starigas, kun aliaj, la teatran kaj kantan trupon La Vagabondoj.
- En la Neŭŝatela Ĵuraso realiĝas oficiala eksperimenta kaj libervola Eo-instruado al gelernantoj de la kvara kaj kvina klasoj de la baza lernejo La Promenade en La Chaux-de-Fonds, kiu estas gvidata de →Claude Gacond.
- Aperas *Esperantal Antologio en Idolinguo. Un introdukto*. Redaktis kaj tradukis →Tazio Carlevaro.
- En Ĝenevo mortas →Yvonne Privat-Bouvier, vidvino de Edmond Privat (+1962).
- Estas eldonita la disko *Tra l' mondo* de →Olivier Tzaut.
- Mortas Paul Arbenz, iama aktivulo de la laŭzana laborista ES.
- En St. Gallen mortas Wilhelm Flammer, iama prezidanto de Svisa Katolika Unuiĝo Esperantista (SKUE).
- En Berno mortas la fervora idisto →Hans Cornioley.

1978

- En Rolle/VD, kie antaŭ 75 jaroj estis fondita SES, okazas memorkunveno en la hotelo Tête Noir.
- Gertrud Eggenberger ekredaktas la revuon *Svisa Fervojisto*.
- →Giorgio Silber kaj →Perla Ari-Martinelli, gvidantoj de *Literatura Foiro*, translokiĝas al Svislando.
- Mortas →Jules Freymond, fervojisto kaj Eo-pioniro, veterano kaj aktiva membro de la laŭzana EG Zamenhof.
- Forpasas →Hugo Fischer, iama aktiva adepto de Interlingua (IALA).

1979

- En Lucerno okazas la 64a Universala Kongreso de Eo.
- La →Eo-balono startas.
- Aperas la libro →*La Fenomeno Svislando* de →Arthur Baur, svisa Eo-poŝtmarko kaj kolora Eo-prospekto pri Lucerno.
- →Andreas (Andy) Künzli aliĝas al la Eo-movado kaj ekredaktas →*La Lucernan Progreson* (ĝis 1985).

- Diversaj ekspozicioj pri Eo kaj interlingvistiko, aranĝitaj de KCE kaj CDELI, estas prezentitaj en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno, en la centra biblioteko de Lucerno kaj en la Trafikdomo de Lucerno.
- En KCE disvolviĝas la unua sesio de IFA en kunordigo de →Giorgio Silfer; kiel rektoro oficas →Claude Piron.

1980aj jaroj

- Dum la 80aj jaroj kelkaj SES-anoj, ekipitaj per verdstelaj ĉemizoj, partoprenas la tradician popolmarŝon, kiu estas ĉiujare organizita en la berna regiono dum du tagoj.
- Lucerna Eo-Grupo ŝanĝas sian nomon al Lucerna Eo-Societo.

1980

- →Arthur Baur transprenas la prezidon de SES (ĝis 1986). UEA atribuas al li la titolon de honora membro.
- La krizo de Svisa Esperanto-Junularo (SEJ) kondukas al ĝia oficiala likvido en Versoix/GE.
- La fervojistoj iniciatas Gajan Eo-Rondon Instruitecan (GERI) de SAEF.
- →Literatura Foiro fondiĝas kiel kooperativa societo kun jure registrita sidejo en Svislando.
- →Perla Ari-Martinelli fariĝas ĉefredaktorino de *Literatura Foiro* (1980-95).
- Aperas *Le familia del antiquario. Komedio en Occidental ed en Interlingua. Kun introdukto kritika e historiala* de la itala verkisto Carlo Goldoni; traduko en Occidental kaj Interlingua de →Tazio Carlevaro (2a eld. 1993).
- En Lucerno mortas →Heinrich Lorenz, konata lucerna e-isto kaj aŭtoro de *Zauberwort Weltrekord*.

1981

- Esperanto-Societo Basel lanĉas la revuon *Kuriero de Esperanto* (aperas ĝis 2000).
- En Bazelo okazas la 54a SAT-kongreso.
- LF-koop komencas eldoni la revuojn *Planlingvistiko*, →*Lombarda E-isto* kaj →*Transalpa Esperantisto* (ĝis 1987).
- Aperas la kasedo *Karnavaletto* de →Olivier Tzaut.
- Hans Kästli aĉetas en Rheineck la domon Sonnenheim (en Eo: →Sunhejmo), kiun li transformas al e-ista tendumejo.
- En Basel forpasas →Philipp-André Schild, unu el la ĉefaj reprezentantoj de Interlingua.

1982

- Fondiĝas la EG de la zurikaj gestudentoj.
- Stariĝas Centre genevois d'information sur l'espéranto en Chêne-Bougeries/GE.
- Kooperativo de →Literatura Foiro malfermas sidejon en Ĝenevo.
- En Romanshorn/TG okazas la 13a trilandna renkontiĝo.
- Mortas Walter Sonderegger, fervora Eo-fervojisto kaj ano de la zurika ES.
- En Arlesheim/BL mortas →Heinrich Nidecker, prezidinto de la bazela Ido-grupo kaj de Suisa Ido-Federuro kaj iama prezidanto de SAPO (Occidental).

1983

- En Lugano (eldonejo Pedrazzini) aperas la itala traduko de la libro *Aventuroj de pioniro* de →Edmond Privat.
- Fondiĝas Junularo Esperantista Svislanda (JES).
- La pola e-isto Tomasz Chmielik ektradukas grandparton de la verkaro de la svisa aŭtoro Friedrich Dürrenmatt.
- En Sempach/LU forpasas →Hector Boffejon, e-isto belg-devena.
- Mortas Karl-Heinz Mischler, iama prezidanto de SES (1971-72).

1984

- En Laŭzano okazas la 4a Internacia Literatura Forumo, organizita de LF-koop.
- En Le Locle/NE mortas →William Perrenoud, tre aktiva e-isto ekde sia junaĝo ĝis 1957, inventinto de la →geonismo kaj aŭtoro de →La Ora Metodo.
- Mortas Heinrich Matzinger, signifa Eo-stenografo en Zuriko.
- Forpasas →Hans-Joachim Unger, elstara ĵurnalisto precipe rilate Eon en turismo.
- En Lausanne mortas →Ric Berger, ĉefa protagonisto de Interlingua (IALA).

1985

- Estas inaŭgurita Piazzetta Esperanto, lingua internazionale, sur centra placo en Solduno, kvartalo de Locarno.
- →Andreas (Andy) Künzli transprenas la redaktadon de de *TEJO-tutmonde*, oficiala gazeto de TEJO.
- Mortas →Johannes Jakob Sturzenegger, verkinto, kun Heinrich Matzinger, de la ampleksa lernolibro *Universala Esperanto-Stenografio Unesteno* (Zürich 1965).
- En Parizo forpasas la svisa e-isto →August Braun, kunfondinto de KCE kaj ĝia unua prezidanto (ĝis 1984), poste ĝia vicprezidanto, kaj vicrektoro de IFA, UEA-delegito en Hauterive/NE kaj iama vicprezidanto de SES.
- En Winterthur mortas Vojslav Pytloun, aktiva loka e-isto.

1986

- →Claude Gacond, kiu ankaŭ estas direktoro de KCE, fariĝas la nova prezidanto de SES. Sub Gacond estas starigita detala laborplano, kiu antaŭvidas ankaŭ strukturajn reformojn en la CK, inkluzive de ĉi-rilataj statutŝanĝoj. Kun la celo stimuli la pli fruktodonan diskutadon kaj la pli koheran kunlaboradon inter la diversaj lokaj kaj fakaj grupoj estas enkondukita la t.n. larĝigita CK, poste nomata federa konsilio de SES.
- →Andreas Künzli komencas kunlabori en la Eo-programo de Svisa Radio Internacia (SRI).
- Aperas la krimromano *Varmas en Romo* de →Corrado Tavanti, konata Eo-verkisto vivanta en en Le Locle/NE.

1987

- La 100-jara jubileo de Eo SES estas festata per tri regionaj kulturaj semajnfinoj kaj per aktivecoj kun reprezentantoj de la amaskomunikiloj.
- Kunlabore kun KCE, estas aranĝita ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en la universitata biblioteko de Bazelo.
- →Andreas Künzli aranĝas ekzpozicion en la zurika Instituto pri slavistiko pri la temo '100 jaroj de slava literaturo en Eo'.
- →Dietrich Weidmann fariĝas ĝenerala sekretario de TEJO (ĝis 1989).
- *Lingua Verde*, komuna periodaĵo de Itala Interlingvistika Centro kaj Tiĉina Esperanto-Ligo, daŭrigas *Lombardan E-iston*.
- En Ebnat-Kappel/SG mortas Emil Zuberbühler, unua vicprezidanto de SAEF en 1925 kaj fervora Eo-fervoisto.
- En Berno mortas Gertrud Weigelt, aktiva loka e-istino.

1988

- →Mireille Grosjean transprenas la oficojn de la prezidantino kaj de la fonduma konsilio de GEP kaj de la direkta komitato de KCE (ambaŭ funkcioj ĝis 1994).
- La fervora pola e-isto →Stanisław Pochanke translokiĝas kun sia familio al Svislando kaj transprenas la gvidon de EK Wil/SG.
- →Kurt Greutert, elstara svisa Eo-organizanto, estas eksigita el SES. Sekve li distanciĝas de la Eo-movado.
- →Lilly Schaerer, longjara aktivulino de SES, demisias de siaj oficoj.

- En Turgovio mortas → Otto Walder, elstara svisa Eo-aktivulo (precipe fervojista) ekde sia junaĝo, en diversaj funkcioj.
- En Berno mortas Heinrich Georg Rotach, aktiva e-isto.
- Forpasas → Friedrich Bierhoff, multjara delegito en Döttingen/AG kaj probable la plej maljuna e-isto de Svislando.

1989

- Dietrich Weidmann finas siajn universitatajn studojn per la licencia diplomverko kun la titolo *Das Kausativ und das Antikausativ in der gemischten Plansprache Eo* (La kaŭzativo kaj la antikaŭzativo en la miksita planlingvo Eo, zurika universitato, publikigita).
- Estas publikigita la disertacio de Mohammad Farrokh (ĝeneva universitato) : *La pensée et l'action d'Edmond Privat (1889-1962). Contribution à l'histoire des idées politiques en Suisse.*
- En Rorschach/SG mortas Ernst Anderegg, iama Ido-aktivulo.

1990aj jaroj

- La privata lernejo La Grande Ourse (fondita en 1983) en La Chaux-de-Fonds instruas Eon en sia oficiala lerneja programo.
- Marie-Louise (Marilou) Münger-Ackermann en Môtiers/NE, teologino kaj diakonino de la neŭŝatela eklezio, estas la oficanta prezidantino de KELI.

1990

- La demisio de → Andres Bickel de sia posteno kiel redaktoro de *Svisa Esperanto-Revuo (SER)* signifas samtempe la finon de tiu periodaĵo, kiu aperis ekde 1973.
- → Paolo Castellina en Borgonovo/GR, gvidanto de Union Interlingua de Helvetia, fariĝas prezidanto de Foundation Bakonyi pro Lingua Universal.
- En Airolo mortas Enea Albertini, iama aktivulo de la tiĉina Eo-movado.

1991

- Sub la titolo → *Svisa Esperanto-Societo informas* → Fritz Liechti ekprizorgas la redaktadon de la nova informilo de SES. Laŭ kontrakto kun LF-koop la membroj de SES ricevas la revuon → *Literatura Foiro (LF)* inkluzive en la societa jarkotizo; *LF* estas eldonita sub la aŭspicio de SES.
- La tiamaj estraranoj de JES Ueli Haenni (prezidanto), Anne-Laure Oguey kaj Didi Weidmann transdonas la prezidan gvidadon al nova generacio de gejunuloj ĉirkaŭ Marion Bélisle-Grosjean el Les Brenets/NE, filino de → Mireille Grosjean-Robert.
- La meritoj de → Claude Gacond estas agnoskitaj per la aljuĝo de la unua FAME-kulturpremio en Aalen (Germanio) je la valoro de 10'000 germanaj markoj.
- Mortas → Emma Louise Bosshard, iama Ido-aktivulino en Zuriko.

1992

- → Svisa Radio Internacia (SRI) decidas ĉesigi la produktadon de la Eo-programo.
- Per la transdono de la prezida funkcio en la zurika ES al → Dietrich (Didi) Michael Weidmann okazas generacia ŝanĝo.
- Lilli Papaloïzos publikigas sian disertacion *Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue. Le Centre culturel espérantiste de La Chaux-de-Fonds* (bazela universitato).
- En libro de la Nebelspalter-aŭtoro Hans A. Jenny → Serge Reverdin estas portretita kiel svisa originalulo, kiu ekde 1983 nomas sin Reĝo Parzival'.
- → Andreas Künzli finas sian universitatan studadon (Zuriko) per licencia diplomverko pri *Esperanto kaj interlingvistiko en la Cara Imperio kaj en Sovetunio* (ricevis Stipendion Lapenna) kaj komencas kolekti materialon por *Svisa Enciklopedio Planlingva* per enketo inter svisaj e-istoj.

- En Ebnat-Kappel/SG mortas Alexander Thaler, fervora e-isto.
- En Kriens/LU mortas Johann Lutz, aktiva kaj helpema e-isto en fervojistaj medioj kaj en la lucerna ES.
- En Dietlikon/ZH forpasas Hans Noll, aktiva fervojista e-isto.
- En La Chaux-de-Fonds mortas René Zollinger, aktiva e-isto.

1993

- Kiel svisa ĉefdelegitino de UEA ekfunkcias → Sonja Brun (ĝis 2002).
- En La Chaux-de-Fonds okazas TEJO-KER-seminario pri la temo ‘Neŭtraleco – ĉu alternativo al ideologio?’
- Estas lanĉita *la svisa kanguruo*, organo de Junularo Esperantista Svislanda (JES).
- En St. Gallen mortas → Lina Reutemann-Klee, per kio finiĝas la Eo-movado en tiu urbo.
- En Binningen/BL mortas → Hermann Schmutz, svisa e-isto kaj fervojisto, edzo de → Jeanne Schmutz-Saenger (+1982).
- En Zuriko mortas → Tina Peter-Rüetschi, aktiva zurika e-istino, kiu lanĉis la Koordinitajn Eo-kursojn.
- En Ĝenevo forpasas → Marc Rohrbach, motoro de la J.E.A.N.-movado kaj apoganto de Eo.

1994

- → Perla Martinelli, kiu estas ankaŭ ĉefredaktorino de *LF* kaj ĝenerala sekretario de la Akademio de Eo (1995-98), fariĝas prezidantino de SES (ĝis 1997).
- → Madeleine Stakian demisias kiel prezidantino de la ĝeneva EG La Stelo, kiun ŝi estris dum longa periodo, redaktante ankaŭ ĝian organon *Brasikfolio*.
- En Parizo (L’Harmattan) aperas *Le défi des langues - Du gâchis au bon sens*, grava franclingva libro verkita de → Claude Piron.
- En Flims-Dorf/GR mortas → Jakob Hohl, instruisto kaj e-isto de 1936.
- En Ĝenevo mortas → Jacques Mühlethaler, konata svisa pacaktivulo, fondinto de Monda Asocio por la lernejo kiel pacinstrumento (EIP) kaj pledanto por Eo.
- En Bazelo forpasas Heinrich Ringli, aktiva ano de la bazela ES.
- En Tiĉino mortas Irene Molinari, aktiva e-istino en Locarno.
- En Gosport (Britio) mortas → Reto Rossetti, frato de → Cezaro Rossetti (+1950), signifa svisdevena Eo-verkisto.
- En Neuchâtel forpasas → Edouard Waldvogel, Eo-aktivulo dum jardekoj, pastro, pacaktivulo kaj civilservisto.

1995

- Post grava gvida kaj financa krizo de KCE/GEP, aktivuloj identaj kun tiuj de Kooperativo de → Literatura Foiro transprenas la gvidadon de KCE. Nova prezidanto de KCE fariĝas → Giorgio Silber. → *Monata Cirkulero* ĉesas aperi kaj estas anstataŭita de la informilo *Ĉe la Dompato* (ĝis 1999).
- Aperas la tria eldono de la studo *La Retoromanĉa - Historio kaj nuntempo de la kvara nacia lingvo de Svislando* de → Arthur Baur en la mikro-eldonejo Hans Dubois en Bellinzona (Svislando).
- Aperas *Le albergatrice* de la itala verkisto Carlo Goldoni en Interlingua-traduko de Tazio Carlevaro. (2a eld. reviziita 1998).
- En Wald/ZH mortas Hans Bickel, signifa → bontemplano, liberpensulo kaj e-isto.
- En St-George/VD mortas → Frédéric Lagnel, iama idisto kaj grava Occidental-propagandisto.
- En Vieno aperas *La Bona Lingvo* de → Claude Piron.

1996

- En Orvin/BE forpasas la e-isto → Marcel Erbetta, fondinto de → Grajnoj en vento.
- Mortas Anna Bertha Gerber, aktiva e-istino en Berno.

- En Neuchâtel mortas →René-William Perrenoud, aktiva svisa e-isto kaj kunlaborinto (librotenisto) de KCE.
- Mortas Alfonsito Varini, fervora e-isto en Locarno/TI.
- →Giorgio Silfer kaj →Perla Martinelli fariĝas svisaj civitanoj.

1997

- Post longa foresto de la Eo-movado →Bruno Graf, e-isto de 1948, revenas kaj transprenas la prezidon en SES.
- La EG Bellinzona ĉesas ekzisti, kaj Tiĉina Esperanto-Ligo (TEL) estas oficiale malfondita.
- En Zuriko forpasas →Maurizio de Sassi, fervora e-isto en la laborista kaj komunista movadoj.
- En Birsfelden/BL mortas →Hans Bipp, fervora aktivulo de SAEF.

1998

- En La Chaux-de-Fonds estas iniciatita la →Esperanta Civito.
- La 28an de aprilo 1998 okazas en la Palaco de Nacioj en Ĝenevo datrevena simpozio de UEA pri la temo 'Lingvo kaj Homaj Rajtoj' sub la aŭspicio de UN-Komisiono pri Homaj Rajtoj (UNCHR) (vd. *Esperanto*, junio 1998).
- En Locarno/TI mortas →Dante Bertolini, konata instruisto, signifa verkisto kaj e-isto.
- En Aarau forpasas →Emmerich Manner, aktiva e-isto en iama Jugoslavio kaj en Zuriko.
- En Zuriko mortas Werner Schaufelberger, aktiva Eo-fervoĵisto kaj fidela membro de la zurika ES.
- En Ĝenevo mortas →Henri Vatré, elstara svisa Eo-literaturisto kaj esperantologo.

1999

- En la ĝeneva gazeto *Le Temps* aperas tekstoj en la elpensita lingvo →Europanto.
- Aperas *Bibliografio di Ido* de →Tazio Carlevaro kaj Reinhard Haupenthal.
- En La Chaux-de-Fonds mortas →Alphonse Matejka, iama internacie signifa planlingvisto, idisto kaj occidentalisto.
- En Grizono forpasas →Flurin Maissen, iama propagandisto de Occidental.

2000

- →Sonja Brun fariĝas prezidantino de KCE (ĝis 2003).
- Kun sia 80a numero *Kuriero de Esperanto* (Bazelo) ĉesas aperi.
- En Aarau mortas →Hans Hunkeler, aktiva fervoĵisto kaj e-isto de 1947.

2001

- La fondumo Gastejo Edmond Privat (GEP), kies lasta formala prezidanto estas Mario Bélisle, likvidiĝas en januaro.
- →Claude Gacond estas elektita kiel honora membro de UEA.
- →Ernst Glättli, fervoĵisto kaj e-isto de 1957, estas nomita honora membro de IFEF.
- Junularo Esperanta Svislanda (JES) revigliĝas ĉirkaŭ Vera Pochanke kaj ties grupo.
- En Langenthal/BE mortas →Lilly Schaerer, senĉesa aktiva e-istino ekde 1932, kies loĝadreso en Langenthal estis la oficiala adreso de SES dum tri jardekoj.
- Mortas →Fritz Liechti-Kilchhofer, aktiva zurika e-isto ekde 1944, iama prezidanto de SES kaj redaktinto de la bulteno *SES informas* (1991-96).

2002

- La nomo de la Eo-placo en Solduno estas ŝanĝita laŭ la nomo de la e-isto kaj konata tiĉina pedagogo kaj verkisto →Dante Bertolini kaj nun nomiĝas Piazzetta Dante Bertolini.
- Lucerna Eo-Societo festas sian 75-jaran jubileon.

- SKUE estas oficiale malfondita.
- PIV 2002 registras la toponiomon Ĉaŭdefono kun la klarigo, ke en ĉi tiu „romandia urbo troviĝas signifaj interlingvistika biblioteko kaj Kultura Centro E-ista“.
- Mortas → Werner Laederach-Emmes, grava zurika e-isto, iama prezidanto de SES.
- En Münchenbuchsee/BE mortas → Hans Herrmann, e-isto de 1946 kaj populara kiel magiisto kun la nomo Hoho, honora membro de SES.
- En Argovio mortas Angelo Mellini, vigla kunlaboranto de la lucerna ES.

2003

- 100-jara jubileo de SES sukcese disvolviĝas en Laŭzano kaj Rolle/VD.
- En La Chaux-de-Fonds okazas la 76a SAT-kongreso.
- Mortas Alfred Wenger, multjara aktiva e-isto en Neuchâtel.
- Forpasas → Walter Giannini, Zollikerberg/ZH, e-isto de 1921 kaj iama pioniro de la alternativaj ĝardenkonstruado, agrikulturo kaj biologia terkultivado.

2004

- Inaŭguro de la t.n. Esperanta Verdejo (france: Verger de l'espéranto) en la kvartalo de KCE en La Chaux-de-Fonds.
- SES partoprenas, kiel membro-observanto, la 6an Eŭropan Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio en Bilbao (Hispanio).
- SAEF estas oficiale malfondita.
- → Perla Martinelli verkas disertacion pri la temo *Edmond Privat: la vita e l'opera* (Centro Italiano di Interlinguistica, Genova)
- En Ĝenevo mortas → Madeleine Stakian, elstara aktivulino de EG La Stelo.

2005

- Bazela Eo-Societo festas sian 100-jaran jubileon.
- Emmanuelle Houlmann, studentino de la friburga universitato, verkas licencian studon pri la temo *Edmond Privat et l'espéranto: son engagement en faveur d'une langue pour la paix 1903-1931*.

2006

- Aperas la Svisa Enciklopedio Planlingva *Universalaj lingvoj en Svislando*, verkita kaj redaktita de → Andreas Künzli.
- La nova estraro de SES estas prezidata de → Mireille Grosjean-Robert kaj → Dietrich Weidmann en komuna plenumo de la ofico.
- En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds okazas festceremonio okaze de la 50-jariĝo de CDELI.
- Forpasas la e-istoj Margrit Guldin, → Heidi Baur-Sallenbach, Yvon Grosjean kaj Franz Brügger.

Andreas Künzli

Resumo kaj provizora konkludaro

1. Svislando kiel centro de pluraj planlingvaj movadoj

Kiel ĉi tiu enciklopedio celas montri, Svislando ludis centran rolon en la historio de pluraj internaciaj movadoj planlingvaj. Svislando do longe estis la lulilo de la:

- internacia movado Volapük, kies sidejo situis en la urbo Konstanco, en la tuja najbareco de Svislando, kaj kiu radiis en Svislandon, precipe orientan (SG, ZH);
- internacia Esperanto-movado (UEA en Ĝenevo, revuo *Esperanto*);
- internacia Ido-movado (Schneeberger en Lüsslingen, Noetzli en Zuriko, Kreis en Ĝenevo, periodaĵo *Progreso*);
- internacia Occidental-Interlingue-movado (Berger, Lagnel, Matekja; periodaĵo *Cosmoglotta*);
- internacia Interlingua-movado (Berger, Fischer, Bakonyj-Fundation, Castellina; periodaĵo *Currero International*, organizo UMI);

En la kazo de la nomitaj planlingvaj projektoj eblas konstati, ke ili sukcesis transformi sian teorion sistemon en vivantan praktikan aplikon kun internacia signifo, dum „lingvoj” kiel Tersboca (Rotter 1912), Parlamento (Perrier/Ferry 1918), Espido (Pesch 1923), Ablemonde (Schwarz 1932), Fitusa (Rosenblum 1935), Soma (Rosenblum 1938), Neolatino (Schild 1947) k.a. restis neefektiveblaj kaj pro tio efemeraj, ĉar ili ne sukcesis trovi adeptaron. Do, la historio de la svisa planlingva movado havas tri-partan strukturon: a) Esperanto kiel plej maljuna, plej grava kaj plej longdaŭra planlingvo kun movado, b) Volapük, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua kiel planlingvoj kun movadoj, kiuj estis gravaj, sed praktikataj nur dum pli malpli longa kaj limigita periodo kaj kiuj malaperis, kaj c) efemeraj lingvoprojektoj, kiuj restis teoriaj proponoj sen adeptaro. Samtempe estas interese konstati, ke aliaj pli malpli gravaj planlingvoj kiel ekzemple Idiom Neutral (1893-1902), Latino sine flexione (1903), Novial (1928) aŭ Basic English (1937) ne estis praktikataj en Svislando.

2. ‘Venko’ de Esperanto inter la planlingvoj

Kompare kun Occidental kaj Interlingua, kiuj estis aŭ fariĝis esence lingvistikaj movadoj, la sola ‘popola’ movado kun realaj sociaj funkcioj do restis la Esperanto-movado, iomete tio validas ankaŭ por la idista movado, kiu en Svislando praktike finiĝis kaj kiu internacie fariĝis efemera. La genia lingva konstruo kaj la ideologia fono de Esperanto kaŭzis ĝian nepridisputeblan venkon super la aliaj planlingvaj sistemoj, kiuj nuntempe staras ekster ĉia diskuto kaj kiuj havas sole sciencesploran valoron. La Esperanto-movado diferenciĝas disde la aliaj planlingvaj movadoj ankaŭ en tio, ke ĝi portas en si la t.n. ‘internan ideon’, kiu siaflanke estas bazita sur la zamenhofa ‘homonarismo’, kiun la aliaj planlingvaj movadoj ne konas. Eblas do starigi la tezon, ke a) planlingvanoj, kiuj transiris al Ido, Occidental kaj Interlingua evidente ne aparte interesiĝis pri ideo kiel homaranismo laŭ sugesto de L.L. Zamenhof, b) dum la esperantistoj

sentas sin unuavice altirataj ĝuste de la ‘interna ideo’ en neŭtrala universala lingvo, kaj malpli de lingv(istik)aj demandoj – do akademiecaj aŭ abstraktaj problemoj de la ortografio aŭ gramatiko kiel supersignoj aŭ akuzativo evidente ne tro interesas ilin. Pro tio la reformprovoj de René de Saussure kaj la proponoj de idistoj, occidentalistoj kaj propagandistoj de Interlingua havis neniun ŝancon esti konsiderata de tiuj, kiuj restis esperantistoj. Jen en tiu cirkonstanco mi kredas esti trovinta ankaŭ la pruvon, kial la amaso de esperantistoj preferas viziti aranĝojn kiel la Universalan Kongreson, dum nur eta malplimulto fariĝis esperantologoj aŭ interlingvistoj kaj partoprenas ĉi-temajn aranĝojn, kiuj restas rezervitaj al elito. Ĉar ‘neŭtralajn’ esperantistojn ankaŭ ne aparte interesas politikaj aferoj, ideo kiel la ‘Esperanta civito’ povis havi ĝis nun nur marĝenan signifon kaj restis la eksperimenta projekto de tre specifaj elituloj. En tiu ĉi kunteksto necesas vidi ankaŭ la iom polemikan diskuton pri ‘finvenkismo’ kaj ‘raŭmismo’, kiu estis lanĉita esence de elitecaj intelektuloj, kiuj kritikas la tro turisman karakteron de diversaj Esperanto-kongresoj, en kiuj ili ne deziras ludi rolon (kvankam ĝuste tiuj Esperanto-kongresoj urĝe bezonus ilin kiel prelegantojn, klerigantojn ktp.). Kiel iuj reprezentantoj de ambaŭ tendaroj konfirmis (ekzemple Corsetti), la nuntempa realeco de la Esperanto-movado respegulas influojn de ambaŭ tendencoj.

3. La planlingva movado kiel tuto multfaceta kaj heterogena

La diversaj planlingvoj disvastiĝis varie laŭ regionoj: Dum Volapük trovis la plimulton de siaj adeptoj en germanlingva orienta Svislando (precipe SG, AR, TG, ZH, AG, LU, BE, BS), la Esperanto-movado ekprosperis en la romanda parto (GE, VD, NE) kaj iom post iom atingis ankaŭ Alemanion. SES fondiĝis en 1903 en Rolle/VD.

Kvankam Ido estis la afero de francaj reformemuloj (Couturat, Leau, de Beaufront), en Svislando Ido estis enkondukita fare de alemanoj (Schneeberger BE, Nötzli ZH, Waltisbühl ZH, Feierabend BE, Schrag BE, Cornioley BE, Matejka SG, Kostezzer SG, Anderegg TG, Wenk BS, Mario Schmid ZH/SZ, Dürst ZH, Nidecker BS, Kreis ZH/GE, Haas ZH, Hamburger SG, Bosshard ZH ktp., supozeble grandparte protestantoj). Kelkaj socialistoj (ZH) kaj katolikoj (LU) transiris al Ido. La kolektiva transiro al la movado Occidental-Interlingue en 1928 estis preparita de romandaj idistoj (Creux FR, Berger VD, Lagnel VD, Mayor VD, Aschwanden, Denzler k.a.). Pri Interlingua, kiu fontis en eksplicite akademiece-lingvistikaj diskutoj (IALA), okupiĝis homoj, kiuj kredis, ke en la naturalisma skolo en planlingvistiko la kulmino estis atingita.

Interesa estas la fenomeno de la t.n. ‘mult’-planlingvanoj: eble dudeko da svisaj adeptoj de neŭtralaj universalaj lingvoj agadis sinsekve (sed ne samtempe) por diversaj planlingvoj (kiel ekzemple Schneeberger por Volapük, Esperanto kaj Ido; kiel Berger por Ido, Occidental kaj Interlingua; kiel Schild por Ido, Occidental, Neolatino kaj Interlingua ktp.). En la senkompromisa klopodo defendi sian laŭdire pli superan lingvosistemon la adeptoj de tiu kategorio ofte kondukis sufiĉe polemike kaj netolere-me, precipe al kolegoj, kiuj adeptis ĉe aliaj planlingvoj (Schrag, Cornioley, Berger, Matejka, Fischer k.a.). Malgraŭ tiu iom konfuza kaj multfaceta bildo eblas observi, ke la diversaj planlingvaj movadoj ĝuis mirindan stabilecon kiam ili ekzistis kaj ke iliaj adeptoj estas karakterizitaj de forta lojaleco al sia propra planlingvo dum jardekoj.

Kompreneble la pli malgrandaj planlingvoj malaperis de la scenejo, kiam elĉerpiĝis iliaj membroj aŭ mortis iliaj protagonistoj.

Demografie, en preskaŭ ĉiuj pli dense loĝataj regionoj kaj kantonoj vivis kaj vivas adeptoj de Esperanto, kompare fortaj ĉeloj ĉiam ekzistis kaj daŭre ekzistas en la urboj Ĝenevo, Laŭzano, Neuchâtel, Bazelo, Zuriko, Lucerno, Berno. La Esperanto-grupoj formiĝis unuavice en urboj aŭ urbetoj, dum en la kamparo ekzistas maksimume unuopuloj neorganizitaj. La planlingva movadeto preskaŭ mankas en konservativaj kaj iom izolitaj regionoj (NW, OW, UR, SZ, GL, AI, VS, FR, JU, BL, GR, TG). Pli frue ekzistis Esperanto-grupoj ankaŭ en malpli grandaj urboj kiel Morges, Vevey, Thun, Bellinzona, Locarno, Chur, Herisau, Burgdorf k.a. Nuntempe tio ne plu estas la kazo, kaj la Esperanto-grupoj en la supre nomitaj grandurboj estas tre malfortaj, parte vegetantaj aŭ eĉ elmortantaj, se refreŝiĝo ne okazos.

El socidemografia vidpunkto la adeptaro de la neŭtralaj universalaj lingvoj formiĝas el plej diversaj *profesioj* (relative multaj instruistoj, fervojistoj, kelkaj kuracistoj, malpli da komercistoj kaj laboristoj), *tavoloj* (precipe mezklasuloj kaj homoj kleraj kun pli alta profesia eduko kaj kun kulturaj interesoj), *seksoj* (viroj kaj virinoj estas pli malpli ekvilibre reprezentataj, ekzistas pluraj esperantistaj geedzoj kaj familioj). Kiel ĉi-koncerna studo de la esperantologo Tazio Carlevaro (1996) povis montri, Esperanton oni lernas kutime antaŭ sia 40a jaraĝo (aŭ en sia pensia aĝo). La Esperanto-komunumon tendence konsistigas homoj eks-junaj, gejunuloj relative malofte videblas en ĝi. Aktivado ofte okazas en la loka grupo, kie oni establas rilatojn profundajn kaj daŭrajn. El tiu bunteco montrita evidentas, ke ekestis pluraj fakaj organizoj, aŭ speco de submovadetoj: ekzemple *instruistoj* (EES, KCE, ILEI-sekcio), *fervojistoj* (SAEF); *religiemuloj* (kristanoj kun KELI- kaj IKUE-sekcioj, bahaanoj), *laboristoj*, *blinduloj* k.a. Esperantisto povas aparteni al diversaj submovadetoj samtempe. La Esperantomovado posedas membrojn, kiuj agadas ankaŭ en movadoj ideologie kvazaŭ iom ‘parencaj’ aŭ almenaŭ ‘najbaraj’. Inter tiuj troviĝis – kaj en unuopaj kazoj daŭre troviĝas – ekzemple la naturamikoj, fervojistoj, laboristoj, religiemuloj ĉiuspecaj, do kristanoj, bahaanoj, kvakeroj, ateistoj, spiritualistoj, bontemplanoj, civilservistoj, framasonoj, vegetaranoj, kontraŭalkoholitoj, pacaktivuloj kaj kontraŭmilitistoj, politikemuloj diversaj, filozofoj, socialistoj, komunistoj kaj kontraŭ-komunistoj, blinduloj, lingvistoj, literaturistoj, ĵurnalistoj, instruistoj-pedagogoj, didaktikistoj, etnistoj, kooperativanoj, sindikatistoj, mondfederalistoj kaj mondcivitanoj, sed ankaŭ komercistoj, skoltoj, biciklistoj, naturistoj, radioamatoroj, filantropoj k.a. La interkontaktoj de la e-istoj kun anoj de parte samcelaj idealismaj kaj filantropiaj movadoj, kaj inverse, ne malofte kaŭzis utilajn sinergiojn. Sed en la menciitaj planlingvaj movadoj ekzistas ankaŭ diverstipaj originaluloj kaj sektemaj tendencoj. Kompreneble la koncernatoj, kiuj de aliaj estas prijuĝitaj kiel originaluloj aŭ sektemuloj, mem ne vidas sin kiel tiajn kaj estas konvinkitaj, ke ili estas en principo pravaj kaj sur la ĝusta vojo (vd. *SES informas* n-ro 2/2004, p. 23-25). UEA-prezidanto Renato Corsetti pravigis la ekzistorajton de alternativaj agadoj en la Esperanto-movado per la alvoko al toleremo kaj kompromisemo laŭ la formulo: „Ĉiu el ni faras ion valoran.”

Kiel asertas kelkaj aŭtoroj, la Esperanto-movado similas al partio aŭ premgrupo kaj ne al ‘popolo’. Laŭ Carlevaro la esperantistoj eble troviĝas hodiaŭ en la si-

tuacio de kultura-etika movado, kun propra lingvo. La lingvo Esperanto funkcias hodiaŭ same bone kiel ajna etnolingvo (en oftaj kazoj eĉ pli bone, ĉar multaj malgrandaj etnolingvoj disponas nur pri subevoluinta parol- kaj skribkulturo). La esperantista komunumo reprezentas do tre apartan soci-kulturan fenomenon, specon de ‘internacia’ aŭ ‘transnacia’ kvazaŭ-etno, novtipan lingvo-komunumon ktp., konsistigatan kaj influatan de multaj diversaj etnoj aŭ etno-kulturoj, kiuj rilatas inter si pere de ‘elpensita’, ‘artefarita’, ‘neŭtrala’ lingvo. Do la Esperanto-komunumo respegulas konglomeraton malfacile kompareblan kun io alia. Carlevaro (kaj aliaj) uzas la nocion *diasporo* por difini la karakteron de la Esperanto-komunumo. Giorgio Silfer aldonis la nociojn ‘transnacia’, ‘mikrosocio’ ktp. Ĉi tiuj nocioj estas kontestataj. Ankaŭ ekzistas disputo (Sakaguchi, Blanke), ĉu Esperanto estas kulturo aŭ havas kulturon. Multaj kritikantoj de Esperanto asertas, ke Esperanto ne havas historion kaj ne povas havi kulturon, kompare kun la historio de ‘tradiciaj’ (aŭ ‘kreskintaj’) etnolingvoj. Kvankam por tia vidpunkto oni povs havi iugradan komprenon, tamen temas pri falsa aserto fare de tiuj, kiuj ne konas la 120-jaran historion de la Esperanto-movado kaj ne estas informitaj pri la historio de la ideo de neŭtrala universala lingvo (aŭ internacia planlingvo), kiu daŭras de pluraj jarcentoj.

4. Provoj je instituciigo

Estis faritaj pluraj provoj kaj klopodoj, ke la planlingvoj instituciigu kaj estu oficiale agnoskitaj de ŝtataj instancoj. En la kazo de Esperanto oni povas registri tian klopodon ekzemple dum la 1920aj jaroj, kiam kadre de Ligo de Nacioj estis provite, per rezolucia projekto (Privat, Bovet k.a.), rekomendi al la membro-ŝtatoj de la Ligo la enkondukon de Esperanto en iliaj lernejoj. La celaro kaj agado de CDELI, KCE/IFA en la 60-80aj jaroj, efektivigitaj precipe de idealismaj romandaj pedagogoj, kiuj dediĉis sian vivon al Esperanto kaj al la studo de planlingvoj, eble signifis dume la kulminon de tiuj strebadoj. Ĝis kiu grado tiuj klopodoj estis/as longdaŭre sukcesaj – tio estas alia demando. Eĉ Claude Gacond, iama direktoro de KCE kaj arkivisto de CDELI, kiu estas konata kiel neskuebla optimisto, ne povas antaŭvidi la situacion, kiu regos post duonjarcento (vd. lian antaŭparolan kontribuon). Fakte neniu tion povas.

Ĉar en Svislando unuavice la kantonj estas respondecaj pri lernejoj kaj kulturaj aferoj, la unuaj kontaktoj rilate la proponon enkonduki neŭtralan universalan lingvon kiel oficialan instrufakon, almenaŭ fakultative, devus esti starigitaj sur kantona nivelo (alia adreso povus esti la Svisa Konferenco de la estroj de kantonaj edukdepartementoj). La Konfederacio mem vidas sin kompetenta en tiaj demandoj nur se temas pri projekto kun tutsvisa signifo – kiel la apogo al la ‘indiĝenaj’ etnolingvoj de Svislando, precipe la malfortaj (itala kaj romanĉa). La konstitucia devo al subteno de la propraj lingvoj kaj kulturoj en la svisaj kantonj fakte tre limigas – aŭ eble eĉ ekskludas – la realan konsideron de internacia planlingvo, ĉar ĝi ne estas de tutlanda graveco, des pli se rolas la argumento, ke neniu internacia organizo aplikas tian lingvon kiel oficialan, malgraŭ platonaj rekomendetoj en la pasinteco (ekz. Unesko), sed kiuj mondvaste havis kvazaŭ neniun realan efikon. Tial la ĉi-koncernaj klopodoj de la Esperanto-movado povas esti nur la afero de privataj iniciatoj. Gravaj esceptoj kiel la enkonduko de Esperanto en radiostaciojn (kiel SRI) eblis dank’ al la fervoro kaj konsento de unuopuloj (ekz. Privat, radiodirektoroj). Aliflanke la diversaj negativaj respondoj de

svisaj ŝtataj aŭtoritatoj al leteroj de unuopaj esperantistoj rilate la enkondukon de Esperanto sur ŝtata/kantona nivelo klare montris la realan maleblan situacion flanke de ŝtataj instancoj. La esperantistoj ne ĉiam posedis la realan flarsenton kiam necesis distingi en demando kien eblus enkonduki Esperanton (ekzemple en la radion aŭ en la kursprogramon de libertempa kleriga centro) kaj kien tute ne (ekzemple en ŝtatajn publikajn lernejojn); male ili plurfoje entreprenis malfeliĉajn elpaŝojn kaj nature seniluziiĝis, kiam la reago estis rifuza. Kvankam la svisaj aŭtoritatoj ripete esprimis sian respekton por la humanismaj intencoj de la Esperanto-movado, ili ĝenerale ne kredis je la sukceso aŭ utilo de ‘artefarita’ lingvo kaj ne vidis la bezonon enkonduki Esperanton en la publikajn lernejojn, despli ĉar la diskutoj pli kaj pli koncentriĝis pri la enkonduko de la angla lingvo en bazajn lernejojn. La forstreko de Esperanto el la programo de Svisa Radio Internacia en 1992 certe estis forta bato kaj reliefigis iusence ankaŭ la ‘lingvan’ politikon de la svisa registaro post la fino de la komunismo en Eŭropo.

5. Interesiĝo, apogo, agnosko, skeptiko, kritiko

Kelkaj signifaj personecoj de la publika vivo ja esprimis sian principan simpatian aŭ eĉ vigle apogis Esperanton, ĉu morale, ĉu finance, ĉu alimaniere: ekzemple Ernest Naville (filozofo), Pierre Bovet (pedagogo, ankaŭ lia filo Daniel), Auguste Forel (psikiatro), Emil Frey (politikisto), Arnold Bohren (politikisto), Eugène Failletaz (komercisto), Jacques Mühlethaler, Pierre Cérésolle, Edouard Claparède, Marc Rohrbach (pacaktivuloj), Marguerite Bossardet (pedagogino) k.a., por nomi nur kelkajn elstarajn svisajn nomojn. Ne malmultaj aliaj, malpli konataj eminentuloj (sur loka nivelo) ludis la rolon de patronoj de Esperanto-societoj (ekzemple Hermann Stroele, Edouard Ducommun, Jean Wenger en Neuchâtel). Oni ne forgesu ankaŭ la vicon de konataj svisaj lingvistoj, kiuj interesiĝis pri la planlingva demando: Ferdinand de Saussure kaj ties frato René, Eduard Schwyzer, Eduard Debrunner, Otto Funke k.a. Sole Gonzague de Reynold, konservativa intelektulo el Friburgo, kadre de Ligo de Nacioj publike malrekomendis Esperanton, kiun li malŝategis kaj nomis „barbara”.

La *ekstera publiko*, kiu ne havis/as spertojn kun Esperanto aŭ alia planlingvo, malfacile imagas pri kio temas. Ĉar la antaŭjuĝoj estas tro fortaj, sekve aperas skeptiko kaj kontraŭstaro. Ĉi tiu ekstera publiko do ne hezitas nomi la esperantistojn utopiistoj, stranguloj, sektemuloj, frenezuloj k.s. (Claude Piron plej interese prikskribis la psikologiajn kompleksojn de homoj, kiuj ne konas – kaj rifuzas – Esperanton). La svisa gazetaro abunde konsideris kaj atentis la temon de la neŭtrala universala lingvo, praktike ian atendo-sintenon rilate la enkondukon de tia lingvo, kiu finfine ne okazis. Observendas granda abismo unuflanke inter la optimismo de planlingvaj adeptoj mem, kiuj diversrimede klopodis vekti publikan atenton kaj varbi por Esperanto pere de la gazetaro, kaj aliflanke de la skeptiko kaj pesimismo ekzemple de ĵurnalistoj, neadeptoj, mal-simpatiantoj aŭ kontraŭuloj, kiuj konservis siajn tradiciajn antaŭjuĝojn aŭ eĉ sian rifuzan sintenon vidalvide de la ekzisto aŭ adopto de neŭtrala universala lingvo.

Koncerne la svisan Esperanto-movadon mem estas konstateble, ke post la fonda kaj pionira periodo, kiu daŭris ekde la komenco de la 20a jarcento ĝis la dua mondmilito, kaj post la stabiliga kaj kreska periodo post 1945 la kulmino de la svisa Esperanto-movado estis atingita fine de la 1980aj jaroj. Ĝia sekva ekzistokrizo koinci-

das kun la falo de la muro en orienta Eŭropo, la enkonduko de nova politika kaj ekonomia ordo en tiun mondoparton kaj la venko de la angla lingvo en politiko, komerco, scienco ktp. Lige kun tiu evoluo ankaŭ la iam fieraj Esperanto-asocioj en la ekskomunismaj landoj draste redimensiiĝis aŭ parte eĉ disfalis. Antaŭ ili cetere staras la tasko prilabori sian rolon dum la komunisma periodo. Komence de la 1990aj jaroj gravaj pilieroj de la Esperanto-movado en Svislando ekkrisis (ekzemple Kultura Centro Esperantista) aŭ eĉ forfalas (ekzemple Gastejo Edmond Privat kaj la Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia), kaj malaperis pluraj fakaj kaj lokaj Esperanto-asocioj, kiuj antaŭ kelkaj jardekoj estis signifaj kaj prosperaj (ekzemple la Esperanto-asocioj de la tiĉinanoj, katolikoj kaj fervojistoj); tial oni estas devigata esprimi sian zorgon pri la estonteco de la Esperanto-movado. Aliflanke aliaj formoj kaj novaj rimedoj kiel ekzemple la mondvasta interreto, ebliganta rapidan interkorespondadon kaj senperan alireblon al informoj (kiuj estas utilaj, se ili estas aktualaj), malfermas novajn perspektivojn. Oni troviĝas en historie grava transira tempo, de kiu ankaŭ la Esperanto-movado ne povas resti netuŝita.

6. Demandoj, tezoj, obstakloj, perspektivoj

La centra tezo (aserto) de mia konkludaro estas, ke *ne* la planlingva demando en si mem kiel opcio por la solvo de la monda lingvoproblemo estas forviŝita de la tablo. Sendube la ideo de la neŭtrala universala lingvo apartenas al la ‘eternaj’ ideoj de la homaro kaj restos senmorta. Aliflanke la ĉefa demando por la lingvo Esperanto povus esti, ke malgraŭ ĝia venko super la ceteraj planlingvaj sistemoj kaj malgraŭ ĝiaj diversaj plusoj kaj avantaĝoj kompare kun nacilingvoj, ĝi verŝajne estos apenaŭ plu konsiderata en estonteco kiel konkreta opcio por la enkonduko en la lernejojn ktp. La ĉefa argumento, kiu apogas tiun aserton, troviĝas en la penso, ke ĝis nun neniu grava forto, nek la ĉefaj mondaj organizaĵoj, nek ties membro-ŝtatoj, adekvate reagis al la perrezoluciaj rekomendoj enkonduki Esperanton aŭ alian planlingvon. Krome, la ideo kiel tiu de neŭtrala universala planlingvo supozeble ricevos novan ŝancon nur kiam en la mondo la naciismo estos abolita kaj komplete venkita fare de la sen-naciismo respektive de la reala monda federalismo, kiel Edmond Privat, unu el la plej eminentaj reprezentantoj de la Esperanto-movado, postulis en sia fama libro *Interpopola Konduto*.

La dua tezo (aserto) estas, eble iom kontraste al la unua, kaj precipe kontraŭdire al la provoka studo de Tazio Carlevaro, *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045* (Bellinzona 1/1999, 2/2000), ke la lingvo Esperanto ne malaperos baldaŭ, alivorte plu vivos ankoraŭ longe, pro tio ke ĝia reproduktiĝo estas garantiata per la aperado de ĉiam novaj esperantistoj kaj ĉar la diaspora karaktero de la Esperanto-movado malhelpos ĝian pereon. Cetere grandparto de la esperantistaro ŝajnas plu kredi je la „fina venko”, kiel montris la rezulto de mia privata esplor-enketo realigita inter 750 UEA-delegitoj en 70 landoj (vd. Ondo de Esperanto, novembro 2005). La esencaj demandoj do estas: Ĉu Esperanto venis tro frue en la mondon kaj kial la homaro ĝis nun restis indiferenta al la realigo de la projekto de la neŭtrala universala lingvo? Ĉu Esperanton iam trafos la sama sorto kiel en la kazo de Ido, Occidental, Interlingua k.a., se ne baldaŭ okazos la internacia agnosko de Esperanto aŭ se forestos la sufiĉa refreŝiĝo en la Esperantokomunumo? Necesus adekvate reagi al tiu situacio, modifi strategiajn prioritatojn de la

Esperanto-movado, sen korekti la originalan celaron, direkti la atenton pli forte al praktikaj-pragmataj agadoj, kiuj havas rapidan eksteran efikon.

Nuntempe la konkurentoj (aŭ konkurenco) de Esperanto ne plu nomiĝas Volapük, Ido, Occidental aŭ Interlingua, sed ĝiaj konkurentoj estas unuavice la sennombraj neregistaraj organizaĵoj (NROj), inkluzive de la politikaj ekstremuloj, religiaj fanatikuloj kaj ekonomiaj profituloj, kiuj aroge prezentas kaj egoisme altrudas sin ekzemple dum NRO-konferencoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj kiuj parte laŭte okupiĝas pri homaj kaj aliaj rajtoj. Sed ĝiaj konkurentoj estas ankaŭ la komercaj kaj aliaj entreprenoj, kiuj aplikas ĉiujn eblajn etnolingvojn, kaj ili estas la altlernejoj kaj universitatoj, kiuj edukas lingvistojn, kibernetikistojn, informadikistojn-komputilistojn-programistojn, tradukistojn kaj sciencistojn ĉiuspecajn, pli kaj pli ofte en la angla lingvo. Komence de la 21a jarcento la naciaj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj vidas tute aliajn prioritatojn ol la realigo de projekto cele al la enkonduko de neŭtrala universala lingvo, kiel la lukton kontraŭ la mondvasta malriĉeco, malsanoj, senlaboreco, populacia eksplodo, malpurigo de la ĉirkaŭaĵo, kiel la provizado per sufiĉaj nutraĵoj kaj de trinkakvo, la klopodojn por la socia integriĝo de la homaro, la malarmadon ktp. ktp.

Kial homoj tiom arde okupiĝas/is pri Esperanto aŭ pri alia planlingvo, defendante ĝin dum longa tempo, estas dokumentite en ĉi tiu Enciklopedio. Kaj pri la senco kaj esenco de Esperanto kaj de la planlingva ideo oni povis/as legi en la Antologio de ĉi tiu Enciklopedio multajn diversajn tre interesajn argumentojn kaj diverĝajn opiniojn – negativajn, pozitivajn, skeptikajn, pesimismajn, optimismajn, de gravaj aŭtoroj, kuintime mem adeptoj de planlingvo(j), el plej diversaj profesiaj kaj fakaj direktoj. Ĉiukaze la esperantistoj troviĝas, rilate siajn ambiciojn unuflanke kaj sian (komplete malgravan) pozicion en la mondo aliflanke kaj ankaŭ en komparo kun la rolo de la angla lingvo en paradoksa situacio, en granda dilemo, kiu kondukas la adeptojn de Esperanto al la proksimeco de la paranojo aŭ skizofrenio. Sed tio estas normala mekanismo ĉe tiutipaj movadoj, kiuj esperas, ke la homaro libervole aliĝos al iliaj iom utopiaj ideoj. Unuflanke la esperantistoj devas agnoski, ke la angla lingvo ludas nuntempe (kaj verŝajne ankoraŭ longe) la dominan rolon ne nur en internaciaj konferencoj, sed ankaŭ ĉie en la internacia komunikado (scienco, kulturo, politiko, ekonomio ktp.). Aliflanke ili estas konvinkitaj, ke Esperanto estus la ideala solvo de la internacia lingvoproblemo, ĉar laŭ ili teorie kaj praktike Esperanto morale superas ne nur la anglan, sed ankaŭ ajnan nurnacilingvan opcion, pro kialoj ĝenerale konataj al ĉiu esperantisto kaj eble ankaŭ al kelkaj ne-esperantistoj. Tial ili daŭre ŝajnas kredi en la finan venkon de Esperanto, eĉ se nuntempe ĝi ne estas videbla. Sed la problemo estas, ke krom la esperantistoj mem neniu signifa forto en la mondo dividas tiun konvinkon. Kiuj perfekte parolas la anglan, ĉu kiel gepatran ĉu kiel fremdan lingvon, por tiuj la lingva problemo en la mondo ŝajne estas nur abstrakta, ‘akademia’ demando; laŭ tiu logiko la esperanta opcio estus principe superflua, ĉar la angla opcio dume venkis kaj plenumas la rolon, kiun Esperanto ŝatus ludi.

Do la ‘anglalingva komplekso’ de la esperantistoj restos profunde ankrita en ilia kolektiva konscio. Tamen: ataki la anglan lingvon nek havas sencon, nek estas kaj ne estu la prioritata zorgo de la esperantistoj. La misio de la Esperanto-movado daŭre estas kaj restas proponi kaj propagandi, apud la gepatraj lingvoj, neŭtralan universalan

lingvon kiel duan lingvon por ĉiuj. En tio mi vidas klaran nuancon kompare kun la monomania sinteno de grandaj nacilingvoj kun imperiismaj trajtoj, kiuj celas marĝenigi aŭ eĉ ekskludi aliajn nacilingvojn. En tiu kunteksto indas kaj necesas daŭre atentigi la publikon pri la lingvoproblemo en la mondo kaj engaĝiĝi sur la kampo de la lingvaj rajtoj kiel parto de la homaj rajtoj. Eŭropo – kaj la internaciaj organizaĵoj – vole nevole estos devigataj okupiĝi pri la lingva demando, en kiu spertaj esperantistoj kaj kompetentaj esperantologoj kaj interlingvistoj povus funkcii kiel konsilantoj.

Malgraŭ vasta skeptiko, kiu estas disvastigita eĉ interne de la Esperanto-medioj mem, Esperanto povus havi aŭ havas realan ŝancon por ludi sian rolon, ne nur kiel hobion por sennombraj individuoj. Sub la kondiĉoj de multlingveco, kiu estas favorata de la politikistoj en Eŭropo, kiuj evidente ne deziras subteni ‘artefaritan’ lingvon kiel Esperanto, ĝi povus ludi pli ofte la rolon de la *neŭtrala* lingvo, ekzemple en la sferoj de kulturo, scienco kaj instruado, krom tio eble ankaŭ en politiko, komerco kaj turismo. En la direkto de tiuj sferoj necesus enkonduki konkretajn eksperimentojn per Esperanto kaj realigi pilotajn projektojn, aktive serĉi eksterajn sponsorojn, kiuj deziras apogi Esperanton, esplori en kiuj lingvaj modeloj Esperanto povus ekhavi lokon kaj aktive lobii, do iel kunludi. La esperantistoj malpli agu el siaj ŝirmitaj kunvenejoj aŭ el la ‘geto’ de Esperanto-kongresejoj aŭ el la akademieca eburturo, kie oni apenaŭ estas rimarkata de la ekstera publiko. Kvankam la kontaktoj kun tiu publiko ja ekzistas, la esperantistoj ofte kaŝas sian esperantistecon kaj tro timas prezenti sin al neesperantistoj. La Esperanto-organizo devas fariĝi pli fortaj, pli memkonsciaj, pli multnombraj, sed ne nepre pli elitismaj. Necesas fortigi la propran organizan infrastrukturon, eduki ‘profesiajn’ esperantistojn, plialtigi ilian kleran nivelon, plibonigi la subevoluintan Esperanto-libro-, servo- kaj varomerkaton ktp. Esperanto devas fariĝi konkurenckapabla. Necesas krei stabilan kadron por studi Esperanton kaj interlingvistikon en lernejoj kaj universitatoj kaj garantii laborlokojn por profesie okupiĝi pri tiuj fakoj. Tiam la diskuto pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn eble povus rehavi sian sencon kaj reatingi sian iaman aktualecon.

La ĉefa problemo de la Esperanto-movado ne estas, ke ĝiaj anoj estus tro idealismaj aŭ tro naivaj, kiel oni kelkfoje riproĉas. La ĉefa problemo de la Esperanto-movado, almenaŭ en Svislando, estas, ke al ĝi ne nur komplete mankas ekonomia bazo kaj politika lobio, sed ke ne estas flegataj kontaktoj kun la civila socio (t.e. kun aliaj proksim-ideaj neregistaraj organizoj). Do la (urĝe bezonatan) lokon en la ‘makrosocio’ la Esperanto-movado komplete ne okupas. Ĝi estas, en la publika konscio, nenie videbla, rimarkebla. Aliaj gravaj obstakloj estas ĝia amatora, eksperimenta, provizora, kelkfoje iom anarkia karakteroj (t.e. ekzistas forta pluralismo de subjektivaj opinioj kaj individuaj agadoj), kaj ke la sukceso aŭ fiasko de ĝiaj agadoj tro forte dependas de la kompetenteco aŭ diletanteco de individuaj fervoruloj kutime honoroficaj.

Kun la ignorema aŭ indiferenta sinteno de la ‘amaso’, de la politiko kaj de la scienca mondo la Esperanto-movado kaj la interlingvistoj devos vivi ankaŭ en estonto, sed oni ne perdu la kuraĝon kaj iru sian ĝisnunan vojon „rekte kaj ne deflankiĝante“. En sia historia dilemo inter revo kaj realo la esperantistoj kaj planlingvanoj ankoraŭ longan tempon devos resti grandaj idealistoj.